# Esperanto aktuell 273

41. Jahr (2022) №3 (273)

Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



Externsteine apud Detmold, kie okazos la venonta Esperantista Migrado Aŭtuna. Ukrainio esperas. Interkultura Centro Herzberg: novaj tempoj, novaj temoj kaj realigebla praktika kunkonstruado! Aŭstria Esperanto-Federacio: Boltzmann, la germana profesoro. 38-a Printempa Semajno Internacia. Germana Esperanto-Asocio: Germana Esperanto-Kongreso GEK 100: Unua informilo. *·kune·* – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Raporto de Internacia Junulara Festivalo 2022. Memoroj de la GEJ-Semajnfino en Halbe.

## Deutscher Esperanto-Bund e.V. Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B
*www.esperanto.de/deb* (Netzpräsenz)

**Bankokonto** (por membrokotizoj kaj donacoj) / **Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge und Spenden): HELADEF1ERB, Sparkasse Odenwaldkreis, DE 3250 8519 5200 4011 4571.
Spenden und Mitgliedsbeiträge für den D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

**Oficejo / Geschäftsstelle: Esperanto-Laden**
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,
Leitung: ***Elke Mondorf***
030 / 5106 2935, 0800 336 3636
Fax: 030 / 4193 5413
*gea.oficejo@esperanto.de*

**Membroprizorgado / Mitgliederbetreuung**
DEB: 0800 - 3 36 36 36 – 21
DEJ: 0800 - 3 36 36 36 – 22

**Briefpost** senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

## Estraro GEA / Vorstand DEB

**Netzpost** an / retmesaĝo al *gea.fe@esperanto.de*
Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar per E-Post-Adresse in der Form *vorname.name@esperanto.de*.

**Prezidanto / Vorsitzender**
***Ulrich Brandenburg,*** Durchwahl: -5111
*gea.prezidanto@esperanto.de*

**Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender**
***Andreas Emmerich,*** Durchwahl: -5112

**Trezoristo / Kassenwart**
***D-ro Matthias Hecking,*** Durchwahl: -5113

**Sekretario / Schriftführer**
**Nils Brinkmann***, Durchwahl -5125*

**Administrado / Verwaltung**
***Barbara Brandenburg,*** *Durchwahl -5125*

**Suborganizoj / Unterorganisationen**
***Andreas Diemel,*** Durchwahl: -5114

**Informteknologioj/Informationstechnologie**
***Franz Kruse,*** Durchwahl: -5119

**Meza generacio / Mittlere Generation**
***Michaela Stegmaier:*** Durchwahl: -5126

**Jugendvertreter / Junulara reprezentanto**
***Michael Vrazitulis,*** Durchwahl: -5118

**Germana Esperanto-Junularo / Deutsche Esperanto-Jugend**
***Michael Vrazitulis,*** Durchwahl: -5211
*michael.vrazitulis@esperanto.de*

## Komisiitoj / Beauftragte

*esperanto.de/deb/beauftragte*

**Gazetaraj kaj publikaj aferoj /Presse und Öffentlichkeitsarbeit**
***Louis von Wunsch-Rolshoven,***
Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112
*louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de*

**Komisiito por retaj kunvenoj / Beauftragter für virtuelle Treffen *Heinz-Wilhelm Sprick,***
*gea.zoom@esperanto.de, tel. Durchwahl -5128*

**Komisiito por rondvojaĝoj/ Rundreisen,**
Durchwahl -5123
***Uli Ender,*** *uli.ender@esperanto.de*

**Informmaterialo/Informationsmaterial**
Goar Engeländer, Durchwahl: -5127
*goar.engelaender@esperanto.de*

**Medienecho**
***Hermann Kroppenberg***, Durchwahl: -5121
*medienecho@esperanto.de*

**Libroservo / Bücherdienst**
D-ro / Dr. ***Wolfgang Schwanzer***,
Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz,
Durchwahl: -5122, *buchversand@esperanto.de, www.esperanto.de/buchversand*

**Komisiito Interreta Redaktado / Beauftragter Internetredaktion**
***Thomas Bormann,*** Durchwahl: -5117
*thomas.bormann@esperanto.de*

**Vertreter des DEB in der EEU-Versammlung/Reprezentanto de GEA en la asembleo de EEU:** Jean-Paul Kuhfahl
Durchwahl: -5116
*jean-paul.kuhfahl@esperanto.de*

## Pliaj adresoj / Weitere Adressen

**Germana Esperanto-Junularo (GEJ) / Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)**
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,
030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412
*www.esperanto.de/gej* (Netzpräsenz)

**Interkultura Centro Herzberg (ICH) / Bildungszentrum des D.E.B.**
Komisiitoj/Beauftragte: ***Zsófia Kóródy*** (instruado), ***Peter Zilvar*** (klerigado kaj kulturo), Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521) 1363, Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax), *ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich*

**Germana Esperanto-Instituto / Deutsches Esperanto-Institut**
Prof. D-ro/Dr. ***Martin Haase***, Lehrstuhl für Romanische Sprachwissenschaft, Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel), -432 (Fax), *martin.haase@esperanto.de, www.esperanto.de/dei*

**Germana Esperanto-Biblioteko / Deutsche Esperanto-Bibliothek**
p/a. ***Karl Heinz Schaeffer,*** Schulstr. 17, 73432 Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)
*biblioteko@esperanto-aalen.de*
*bibliothek-aalen@esperanto.de*
*www.esperanto.de/bibliothek*

**Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung**
***Andreas Emmerich,*** *estraro@fame-stiftung.de* (nur por FAME)

**Stiftung Mondo**
Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,
030/6920 4846-1, *stiftungmondo@gmail.com,*
Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG, BLZ 600 901 00.
Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

**Aŭstria Esperanto-Federacio / Österreichischer Esperanto-Verband**
*aef@esperanto.at, www.esperanto.at*

**Esperantomuzeo Vieno / Esperantomuseum Wien**
Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien,
+43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 25, 1015 Wien, *plansprachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm*

**UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundesbeauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA Germanio / Deutschland**
D-ro / Dr. ***Wolfgang Schwanzer***, Adressen siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

**Aŭstrio / Österreich**
***Leopold Patek,*** Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg, Poŝtel.
+43/66473611289,
*aon.913548977@aon.at*

***Esperanto aktuell***
ISSN 0942-024 X

**Eldonisto / Herausgeber**
Deutscher Esperanto-Bund e.V.,
der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

**Redaktista teamo / Redaktion:**
***Stano Marček*** (Martin/Slovakio),
***Yashovardhan Singh***, Im Johannistal 23, 42119 Wuppertal. Durchwahl: -54

**Kunlaborantoj / feste Beiträger:**
***Aŭstria Esperanto-Federacio***
***Hermann Kroppenberg*** (Medienecho),
***Utho Maier*** (Bibliotheken), Peter Zilvar (ICH)

**Presejo / Druck:** Alfaprint, Martin, Slovakio

*Esperanto aktuell* kun *-kune-* havas ses numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo (vidu maldekstre supre) por 19 € (de eksterlando: 25 €) jare.

*Esperanto aktuell* mit *-kune-* erscheint sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 19 € (Ausland: 25 €) jährlich; für ordentliche Mitglieder im Beitrag enthalten.

**Anoncoj / Anzeigen:**
Skribu al / Schreiben Sie an: *deb@esperanto.de*

**Kontribuoj / Beiträge**
Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato *.doc a.s.) al *ea@esperanto.de*, por n-ro 2022/4 ĝis la 15-a de julio 2022. Paperaj kontribuoj nur esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im Format *.doc o.ä.) an *ea@esperanto.de*, für Nr. 2022/4 bis zum 15. Juli 2022. Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann an Yashovardhan Singh (s.o.).



# Karaj legantoj,

la eldonritmo de nia revuo ne ĉiam konformas kun la datoj de niaj eventoj. Nia ĉi-jara (la 99-a) kongreso okazos de la 3-a ĝis la 6-a de junio en Oldenburg. Mi jam maltrafis la limdaton por la nuna eldono de *Esperanto aktuell*, sed mi skribas mian leteron du semajnojn antaŭ tiu evento por revuo, kiu aperos post ĝi. Kion do mi povas anticipi por la kongreso?

Vi denove renkontos unu la alian: ĝis nun ni havas ĉirkaŭ 150 aliĝojn plus la junularan aranĝon KEKSO, kaj ni povos kunveni ĉeeste – la unuan fojon depost 2019. Vi povos ankaŭ sekvi partojn de la kongreso malĉeeste, dank' al niaj specialistoj pri virtualaj kaj hibridaj kunvenoj sub la gvido de Heinz Sprick. Vi spertos bonegan programon – tiel altkvalitan, ke kelkaj jam komparas ĝin kun „kongresa universitato" – kaj kompetentan organizadon.

Unuafoje depost 2018 ni denove havas funkciantan Lokan Kongresan Komitaton. Vi konatiĝos kun la ĉarma universitata urbo, kiu havas longan kaj faman historion. Kaj vi fariĝos parto de eksperimento: La unuan fojon ni enkonstruis nian kongreson en pli grandan projekton, subvenciatan de la Eŭropa Unio per la programo Erasmus+. Temas pri „malgranda partnera projekto" kune kun Esperanto Nederland pri la temo „daŭripovo". La temo estas sufiĉe aktuala por veki intereson (almenaŭ tiun de niaj subvencidonantoj), kaj ne estis tro malfacile trovi inter ni kompetentajn prelegantojn por kovri diversajn aspektojn de la temo. Ni vidos en Oldenburg, kiom da intereso la programo trovos inter la partoprenantoj. En ĉiu kazo Oldenburg ne estos la fino de tiu projekto. Sekvos ankoraŭ publikigo de la kontribuoj kaj konkluda kunveno komence de oktobro en Groningen.

Por la jubilea 100-a kongreso de GEA ni jam decidis pri la loko kaj dato: ĝi okazos inter la 26-a kaj la 29-a de majo 2023 en Braunschweig, loko de la unua Germana Esperanto-Kongreso en 1906 (kaj de la 50-a en 1972 kaj la 84-a en 2006). Simile kiel en Oldenburg ni interkonsentis kun la junulargastejo pri uzo de ĝiaj kunvenejoj kaj loĝigo de partoprenantoj. Kiel temon ni proponas „Amikoj tutmonde". Kiel konvenas por jubilea kongreso, ni kun niaj eksterlandaj gastoj pritraktos la historion de la Esperanto-movado en Germanio kaj ĝiajn perspektivojn en rapide ŝanĝiĝanta medio. Tutmondiĝo ankaŭ influas Esperantujon, kaj internacia komunikado draste plimultiĝis. Kiu estu nia mesaĝo okaze de la 100-a kongreso kaj la ĉefa fokuso de ties programo? Kelkajn bonajn ideojn mi jam aŭdis. Mi tre esperas, ke venos pliaj (kaj personoj pretaj realigi ilin). Okazojn pridiskuti tiun demandon ni havos en Oldenburg kaj dum la kunveno de la Asocia Konsilantaro en Herzberg (5-a de novembro 2022). Por la malferma kunsido de nia centa kongreso ni jam rezervis la festsalonon de la malnova urbodomo. Kaj post la kongreso ni ofertos plilongigajn tagojn en la regiono kun ĉefe turisma programo. Ĉio, kompreneble, se la viruso ne revenos kaj la ĉielo ne falos al ni sur la kapon.

La forfalo de multaj limigoj pro la koronvirusa pandemio ankaŭ permesas denove pli normalan Esperanto-vivon je la loka nivelo. Ekzemple ĵus atingis min informoj pri sukcesa partopreno de esperantistoj en la Ponta Festo en Frankfurt (Oder) kaj Eŭropa Tago en Guben/Gubin, ambaŭ ĉe la limo al Pollando kaj kun partopreno de niaj polaj gekolegoj. Kaj en plena somero (24-a kaj 25-a de junio) sub libera ĉielo apud Tegeler See en Berlino – finfine denove en ĉeesta formo – okazos la lingva festivalo „Expolingua", en kiu la germanaj esperantistoj tradicie partoprenas. Ni uzu la ŝancojn tiel longe kiel eblas. Kaj ni esperu, ke ankaŭ ĉi-vintre ni povos reveni al normaleco.

Mi ĝojas revidi vin!

**Ulrich Brandenburg**

# Enhavtabelo/Inhalt

**1:** Externsteine [pron. Ekstanŝtajne], sabloŝtona roka formacio proksime de Detmold, kie okazos la venonta Esperantista Migrado Aŭtuna.

**2: Adresoj.**

**3: Germana Esperanto-Asocio:** Karaj legantoj. Enhavtabelo.

**4-6:** Ukrainio esperas. Mortis Klaus Leith.

**7-8: Interkultura Centro Herzberg:** Karaj gesamideanoj, novaj tempoj, novaj temoj kaj realigebla praktika kunkonstruado! Konstantaj laboroj.

**9-11: Aŭstria Esperanto-Federacio:** Nova Renkontiĝo en Bratislavo. UN CoPV – la packomitato Vieno kadre de Unuiĝintaj Nacioj. Boltzmann, la germana profesoro.

**11:** Forlasis nin Ursula Schrapp.

**12-13: Medienecho.**

**14: 38-a Printempo Semajno Internacia.**

**15: Internacia agado:** Alvoko de pastoro Bukuru Ruburaga Nabahena el Kongo.

**16: Publika agado:** EU-Zukunfts-konferenz und Esperanto.

**17-20: Germana Esperanto-Asocio:** Germana Esperanto-Kongreso GEK 100. Unua informilo.

**21-22: Kulturfestivalo:** 10-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Programo de la 11-a Kultura Festivalo.

**23: El la landaj kaj fakaj ligoj:** Einladung zum REVELO-Tag und zur Landesversammlung des Rheinisch-Esperanto-Verbandes. *IntBlog* - das Interlinguistische Blog. Carnap und Esperanto in neuem Sammelband.

**24: Kalendaro.**

**25-32: ·kune· – revueto de Germana Esperanto-Junularo:** Enkonduke. Raporto de Internacia Junulara Festivalo 2022. Memoroj de la GEJ-Semajnfino en Halbe. Mach mit bei der Orga für Treffen im Herbst! Zeltlager vom 11. bis 20. August in Moustier-sur-Sambre, Belgien. Neuigkeiten bzgl. Fahrt-kostenzuschüssen. Karota kuko kun glazuro de kremofromaĝo.

# Ukrainio esperas...

## Saluton, karaj legantoj!

**Ĉiuj scias, ke Esperanto estas paca lingvo. Ĝi servas por internacia kaj interkultura komunikado. Oni uzas ĝin por paroli, por korespondi, por labori.**

En Esperanto homoj okupiĝas pri scienco, pri ekonomio, pri naturo. Oni verkas librojn en Esperanto. Oni kantas en nia lingvo. Oni vojaĝas pere de ĝi. Do, neniam Esperanto servis kaj – ni certas – servos al malbono, al perforto. **Male, nur por prospero kaj unuigo de homoj**.

Nia rubriko jam rakontis pri multaj ekzemploj de utila uzo de nia unika lingvo. Ĉi-foje ni iom prezentos sciencan kaj instruatan Esperanton.

Temos pri Ukrainio. En ĝia okcidenta parto ekzistas la urbo Lucjk (Lucko). Ĝi estas antikva, bela urbo kun riĉa historio, la ĉefurbo de la Volinia regiono de Ukrainio. *Juna Amiko* jam prezentis ĝin en la unuaj publikaĵoj de *Interkultura Mondo* antaŭ 15 jaroj. Nun ni daŭrigas la prezenton.

En la Volinia nacia universitato je la nomo de la fama verkistino Lesja Ukrainka en Lucjk jam de multaj jaroj ekzistas Esperanto-centro. Gvidas ĝin nia samideanino, profesoro Nina Danylyuk. Ŝi estas aktiva membro de ILEI – Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, estro de la ukrainia ILEI-sekcio, ano de la Universitata laborgrupo de ILEI. Tiu grupo unuigas Esperanto-movadon en diversaj altlernejoj tra la tuta mondo. *Interkultura Mondo* ĉi-numere disponigas siajn paĝojn al la rakonto de Nina pri la tradicioj kaj nuntempo de la Esperanto-instruado en Ukrainio:



La studentinoj deklamas la poezion de Lesja Ukrainka.

«Instruado de Esperanto en Ukrainio havas longan tradicion, kiu startis fine de la 19-a – komence de la 20-a jarcento. Oni lernis internacian lingvon en Esperanto-rondoj en la urboj Odesa (1889), Lviv (1906), Kijiv (1910). La unua lernolibro por ukrainoj aperis en la jaro 1907. La unua Esperanto-revuo "Ukraina stelo" estis eldonita en la jaro 1913. Sed en la jaro 1914 venis la Unua Mondmilito, kiu haltigis la procezon.

En la 20-30-aj jaroj de la pasinta jarcento aktivis Esperanto-kursoj en la urboj Ĥarkiv, Kijiv, Odesa. Tiam ankaŭ aperis novaj lernolibroj kaj vortaroj. Tamen fine de la 30-aj jaroj multaj esperantistoj estis prizonigitaj kiel viktimoj de reprezalioj de la tiama reĝimo de Stalin. Inter ili estis fama poeto kaj tradukisto Eŭgeno Miĥalskij. En la jaro 1939 venis la Dua Mondmilito kaj ne eblis plu okupiĝi pri Esperanto.




El la librokolekto en la universitata Esperanto-centro.



La partoprenantoj de la scienca projekto "Lesja Ukrainka en la mondo de tradukoj".

E-instruado en Ukrainio renoviĝis en la 60-80-aj jaroj de la 20-a jarcento. Aperis lernolibroj kaj vortaroj, novaj kursoj en la urboj Kijiv, Lviv, Ĥmelnickij k.a. Estis eldonataj revuo "Tra Soveta Ukrainio", tradukoj de la ukrainaj kantoj kaj fabeloj, tradukitaj verkoj de la ukrainaj klasikuloj Taras Ŝevĉenko kaj Lesja Ukrainka, legendoj de la E-verkisto kaj pedagogo Vasil Eroŝenko. Multe faris por tio verkistino kaj tradukistino Nadija Andrianova-Hordijenko. Esperanto estis instruata en la kursoj por komencantoj ĉe la urbaj kluboj.

Granda aktivigo de Esperanto-instruado okazis en la 90-aj jaroj, kiam Ukrainio fariĝis sendependa ŝtato (1991). En la jaro 1990 estis fondita Ukrainia Esperanto-Asocio, kiu havis instru-metodikan fakon. Danke al Volodimir Pacjurko, Mikola Voloŝin kaj aliaj oni renovigis la eldonon de la revuo "Ukraina stelo". Aperis la lernilo "Ŝlosilo al Esperanto (ukraina)", "Ukraina Esperanto-vortaro-minimumo", "Esperanto: lernolibro de internacia lingvo (laŭ Zagreba metodo)" (Viktor Pajuk) k.a. Esperanto-kursoj funkciis en multaj regionaj urboj kaj en la ĉefurbo Kijiv.

En la jaro 2000 estis fondita ukrainia sekcio de ILEI sub gvido de Nina Danylyuk. Ŝi preparis la programon de fakultativaj kursoj por lernejoj kaj gimnazioj, kiu estis aprobita en Ministerio pri Klerigo. Esperanto estis instruata en la liceo № 38 en Kijiv (sub gvido de Mikaelo Lineckij) kaj en la gimnazio № 21 en la urbo Lucjk (gvide de Nina Danylyuk). Aperis "Granda Esperanta-Ukraina Vortaro" (preskaŭ 80 000 vortoj), kiun kompilis Volodmir Pacjurko kaj eldonis Eŭheno Kovtonjuk. Por Esperanto-instruado helpis "Ora libro de Esperanto: plena lernolibro de internacia lingvo" kaj "Esperanto per rekta metodo" de Stano Marĉek, tradukita al la ukraina lingvo fare de Mikaelo Lineckij, reta lernolibro de Andrij Jankovsjkij k.a. Estis eldonitaj jubileaj verkoj de Taras Ŝevĉenko kaj Ivan Franko en Esperanto-tradukoj. Krome estis tradukitaj de Esperanto al la ukraina lingvo verkoj de Ludoviko Zamenhof kaj de aliaj famaj aŭtoroj. La eldono nomiĝas "Verda antologio", kompilita danke al Viktor Pajuk. Interlingvistiko kaj Esperanto estis instruataj en Lesja Ukrainka Volinia nacia universitato, kie funkcias E-centro kun bona kolekto de lerniloj (fare de Nina Danylyuk). En la sama universitato estis lanĉita Internacia projekto "Lesja Ukrainka en la mondo de tradukoj". Enkadre de ĝi aperis lernolibro por studentoj, en kiu unu ĉapitron formas la pristudoj de E-tradukoj. E-kursojn por komencantoj oni okazigis en la ĉefurbo Kijiv, en la urboj Odesa, Ĥarkiv, Ternopil, Lviv k.a.


La studentino Tetjana Karpiv prezentas la poemon de Taras Ŝevĉenko en Esperanto.


Dum la prelego por gelernantoj en la universitata Esperanto-centro.

La pandemio de la koronviruso dum la lastaj 3 jaroj malhelpis disvolvigi E-movadon kaj okazigi E-instruadon. Tamen retan E-kurson por emeritoj sukcese gvidis Svitlana Pohorila (Pogorelaja). Krome rete okazis instru-metodika seminario kaj AMO-seminario. Nova ondo de malfacilaĵoj en Ukrainio ĉi-jare tute malebligis E-instruadon. Tamen ni esperas kaj sendube certas je baldaŭa renovigo de E-movado en nia lando.»

Kaj tio nepre okazos, kredas *Interkultura Mondo*! Ja Esperanto kiel paca lingvo havas noblajn celojn kaj vere unuigas homojn. Tion oni spertis, ekzemple, dum la internacia ret-kunveno la 15-an de decembro 2021. Ĝin organizis Nacia Scienca Biblioteko en la urbo Odesa. La aranĝo estis dediĉita al la tradicia festo – Tago de Esperanta Libro. Ĝin partoprenis la esperantistoj el Ukrainio, Rusio, Anglio, Kanado…

Do, karaj legantoj, vi vidas, ke evoluo de la homa socio daŭras. Neniuj cirkonstancoj kaj obstakloj kapablas haltigi ĝin. Bono ĉiam venkos malbonon. *Interkultura*



**Dum la naskiĝtaga festo de Lesja Ukrainka en la Volinia nacia universitato.**










**Esperantaj poŝt-markoj, eldonitaj en Ukrainio (la pentristo Mikola Voloŝin).**

*Mondo* tutcerte kredas je tio! Kaj nia lingvo Esperanto laŭ siaj unikaj ebloj helpas al tio. **"Espero" estas ne nur la radiko en la nomo de Esperanto, sed la vojo al paco, interkompreno kaj amikeco!**

**La rubriko** *Interkultura Mondo* **de la revuo** *Juna Amiko* **esprimas koran dankon – kun Espero! – al nia samideanino Nina Danylyuk pro la disponigitaj materialoj!**

**Elena Nadikova, la gvidantino de Esperanto-klubo "Betuleto", Rusio**, *lena_espero@mail.ru*

(El *Juna Amiko* 2/2022)

# Mortis Klaus Leith (64)

Nia kara klubano Klaus Leith mortis dimanĉon, la 3-an de aprilo 2022 en malsanulejo apud Stuttgart, post kelksemajna serioza malsaniĝo.

Kia tragedio la morto de Klaus estis kaj estas por lia edzino Helena, estas apenaŭ imagebla.

Sed lia forpaso ankaŭ estas grava perdo por la loka, nacia kaj eŭropa Esperanto-komunumoj kaj organizaĵoj. Intertempe venis al mi – rekte kaj per cirkuleroj – multaj reagoj el la movado: ŝokitaj, tristaj, nekredemaj ĉu vere li mortis.

En skriba kontakto en 2006 Klaus rakontis, ke li eklernis Esperanton kiel 18-jarulo, sed poste paŭzis dum preskaŭ 30 jaroj. Denove pasis 14 jaroj ĝis li antaŭ pli-malpli du jaroj kaj duono subite reaperis en nia loka rondo en Kolonjo kaj baldaŭ ankaŭ en naciaj kaj eŭropaj cirkloj. Klare videbla estis lia ĝojo ke, finfine – post la pensiuliĝo de sia laborloko en Bruselo, kie li laboris kiel tradukisto ĉe la eŭropaj instancoj – li povis pli intense engaĝiĝi en Esperantujo.

Krom instali retejon por nia klubo kaj digitale gvidi nin en la modernan digitalan epokon pere de zumaj kunvenoj dum la pandemio, li plibonigis la varbadon por la internacia lingvo kaj establis regulan perkomputilan kontakton kun kelkaj ĝemelaj urboj de Kolonjo.

Baldaŭ ni spertis kaj eksciis, ke li ankaŭ laboris senlace je regiona, nacia kaj eŭropa niveloj, aparte por la agado kadre de la „Konferenco pri la Estonteco de Europo". Li estis regula partoprenanto kaj preleganto ĉe diversaj digitalaj konferencoj, ne nur pri la supre menciitaj agadoj, sed ankaŭ pri matematiko kaj la nazia epoko en Kolonjo.

Dum spontanea, kvazaŭ funebra mezaprila sesio de la retejo „Trinkejo" de Dima, rusa samideano, pli ol 20 ĉeestantoj el 10 landoj memoris Klaus, rakontis anekdotojn, disdividis informojn, kiel ili renkontis lin, kunlaboris kun li ktp. Oni eksciis pliajn, ofte surprizajn detalojn pri Klaus, ekzemple lian intereson pri Ĥemio aŭ




**Klaus Leith prezentis la UEA/EEU-kampanjon pri la eŭropunia „Konferenco pri la estonteco de Eŭropo" dum la Beneluksa Kongreso 2021 en Charleroi (BE).**

ke li kiel ateisto korespondis manskribe kun eksterlanda pastro kaj amikiĝis kun li.

Ĉiuj, kiuj konis lin, laŭdis kaj admiris Klaus pro lia granda energio, la kvanto kaj la varieco de novaj ideoj kaj lia laboremo por realigi ilin kaj antaŭenpuŝi siajn agadojn kaj iniciativojn.

Oni priskribis lin kiel bonhumura, poliglota, scivolema, grandanima kaj malŝparema. Eblis malferme kaj bonetose diskuti kun li eĉ pri tiklaj temoj kaj ĝenerale paroli pri „Dio kaj la mondo", kiel oni diras en la germana. Per sia nura ĉeesto Klaus simple kreis afablan etoson.

Ni akre sentas jam nun lian mankon – verŝajne oni bezonos plurajn homojn por sukcese daŭrigi liajn multfacetajn projektojn por lingva egalrajteco kaj la justa solvo de la monda lingvoproblemo.

Kara Klaus, ni honoros vin per la daŭrigo de via laboro – vi restu en paco.

**Harald Schmitz, Kolonja Esperanto-Klubo**

# Karaj gesamideanoj, novaj tempoj, novaj temoj kaj realigebla praktika kunkonstruado!

**En la lasta tempo, ĉefe danke al nia „verda kaj esperiga" urbo-administracio kaj nia nova urbestro Christopher Wagner, povis okazi ekzemple ekster-ordinara informkampanjo, en pli ol 80% el ĉiuj germanaj gazetoj kaj multaj retkanaloj, fakgazetoj, ktp. pri Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo kaj ĝenerale pri Esperanto, ofte kun fotoj.**

Tio estas vere unika fenomeno en la mondo. Esperanto bezonas perceptadon en la amasmedioj. Multaj homoj neniam aŭdis ion pri Esperanto. Kelkaj pensas, ke la retforumoj ktp. sufiĉas, almenaŭ por interna uzo.

Ankaŭ okazis kelkaj radiointervjuoj kaj eta filmeto ĉe la TV-kanalo SAT1.

En printempo denove vizitis nin du famaj ĵurnalistoj kaj libroaŭtoroj. Ili intervjuis i.a. nian urbestron kaj faris multajn Esperanto-rilatajn fotojn en plej diversaj lokoj de la urbo.

Petro Zilvar respondis al multaj demandoj. En iu libro pri la specialaĵoj el la Harz-regiono ili ankaŭ verkos pri la unika Esperanto-urbo. Krome ili planas dum frusomero informi ĉiujn gazetojn en Germanio pri la Esperanto-urbo Herzberg kaj Esperanto ĝenerale.

En la lastaj monatoj ni faris kelkajn bazajn ordigad-laborojn, sed ekzistas ĉie ajn multaj ordigendaj libroj, duoblaĵoj kaj aliaj E-materialoj kaj konstantaj gravaj taskoj. Principe ĉio estas en bona stato, sed estas ankoraŭ „multaj plugendaj E-kampoj". Ankaŭ nia parksimila „Esperanto-ĝardeno" kun multaj plantoj kaj floroj, ekz. Zamenhof-grimp-rozujo, Esperanto-klematitoj ktp. estas en konstanta pri-laborado. Ofte venas subitaj gastoj el Germanio kaj aliaj landoj.







**A.1) Iom pri la nunaj bonŝancoj kaj defioj de la Esperanto-Centro kaj per kaj por la Esperanto-urbo.**

Ebla agendo (estas tiom da bonŝancoj) por movigi ion por Esperanto, grandparte en la „normalan publikan mondon".

**Estas nur kelkaj ekzemploj por ni kaj vi!**

a) Rekontrolado de la Esperanto-libroj en la urba biblioteko, ĉar poste ni povos meti ilin en la urban biblioteksistemon kun publika distancluebloj (supozeble nur ĉirkaŭ trisemajna laboreto dum la malfermhoroj de nia urba biblioteko).

b) Registrado kaj fotado de ĉiuj E-rilataj vojmontriloj, ŝildetoj, objektoj, informtabuloj ktp., kiujn ni realigis dum la lastaj jardekoj. Tio tre urĝas, ĉar ekz. oficistoj kaj politikistoj ĉiam bezonas konkretajn informojn kaj ekzemplojn (ĉu eble inter 250 - 300 ?).

c) Registrado de novaj E-libroj kaj kompletigado. Ekzemple estos bonŝanco kunligi nian riĉan "E-bibliotekon" rete kun la grandega Biblioteko de la Universitato Göttingen. Laŭ niaj opinioj Esperanto devas eniri en la publikajn servosistemojn, ktp.

ĉ) Administrado, organizado, informado kaj varbado (diversforme) en Herzberg kaj en diversaj urboj en la larĝa regiono, ktp.

d) Varbado de novaj specialistoj, ekz. por kreado de dulingva "Esperanto-esplorpado", kiu kunligas la jam multajn E-rilatajn haltostaciojn (Tio gravas por varbi homojn por Esperanto).

e) Preparado, resp. helpado de venonta temoekspozicio por la kastela muzeo.

f) Fondo de konstanta Kuratorio kun aktivuloj kaj subtenontoj „Esperanto-Centro en la Esperanto-urbo".

g) Ni havas multajn realigendajn ideojn kaj bonajn kontaktojn, ekz. al aliaj kulturasoscioj, ktp.

**A.2) Eblaj unuaj „celgrupoj", resp. alparol-partneroj.**

– Alvokoj per nia informilo *Harca E-Kuriero, Esperanto-aktuell, Revuo Esperanto.*
– Konkretaj temoj dum niaj estrarkunsidoj kaj specialaj semajnfinaj seminarioj (bonvenon!)
– Per diversaj retkanaloj, flugfolioj kaj via „perbuŝa varbado"
– Serĉado por seriozaj kunkreantoj, ekz. per alvoko ĉe TEJO kaj per EU-projektoj, ktp.
– Organizado de kreema, aktiva kaj respondecema kun-kreantaro, por komune majstri la estontajn bonŝancojn kaj E-defiojn. Esperanto bezonas kaj meritas realajn publikajn sukcesojn!

Ni vetas, ke ni trovos kelkajn kunagantajn idealistojn, por kiuj Esperanto estas vera „korafero“! Esperanto ne devas kaŝi sin.

**B) Unikaj, eĉ regionaj Esperanto-bonŝancoj ekde aŭtuno 2022?**

Eble vi jam aŭdis, ke ekzistas eksterordinaraj bonŝancoj por disvastigi la jam bonajn E-rezultojn kaj krei novajn stabiligajn faktojn danke al la "senlaca Esperanto-Centro" kaj nia unika "urbodomo de Esperanto-urbo Herzberg".

Nur se la kompetenta E-teamo sub gvido de la sperta estraro de EGS (Esperanto-Centro) kreskos por la multaj paralelaj taskoj, ni povos riski en kunlaborado kun nia distrikto krei daŭripovan Esperanto-infrastrukturon. Tio estus unika bonŝanco por Esperanto en la mondo.

Konstanta Esperanto-teamo havas multajn avantaĝojn: Altnivela lingvouzo por multaj situacioj, oftaj Esperanto-gastoj, unikaj bibliotekoj kaj multtemaj arkivoj, realigado de konstantaj kaj novaj ideoj, ofte en interligo kun la administracio de Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo.

Kuraĝe antaŭen kaj dankon pro via komprenemo, eble transiro de la Esperanto-domo por la E-movado kiel konstanta kreema kaj respondeca Esperanto-Centro.

Certe ni ricevos pozitivajn eĥojn de vi. Laŭ interkonsento vi povos viziti nin pro detalaj interparoloj.

Anticipe ni kore dankas vin. Havu sanan kaj feliĉan somerumadon.

Amike kaj samideane salutas
je nome de la Esperanto-Centro
**P. Zilvar, H. Mantz kaj Zsofia Korody**

# Konstantaj laboroj

**Ni nur volas informi vin almenaŭ pri niaj konstantaj laboroj, resp. kelkaj realaj E-paŝoj antaŭen (je favoro por Esperanto).**

1. Ordigadoj en la Esperanto-Centro kaj plibeligo de la Esperanto-ĝardeno apartenas al la konstantaj taskoj.

Nia unika Zamenhof-grimprozujo ricevis pli belan kaj pli stabilan pavilonon el metalo. Baldaŭ ĝi ekfloros. Bonvenon!

2. Ĉiusemajne ni havis gastojn, ekz. lastsemajne Wilson kaj Lynn el Singapuro. Tio estis aparte agrablaj tagoj. »»

Ĝis nun ni havis E-gastojn el ĉ. 55 landoj, do „plua lando“ por nia Esperanto-gastolibro.

3. Iom ni subtenas familion el Kievo, kiu nun loĝas en Göttingen.

4. Venontan semajnfinon ni partoprenos Skotan E-kongreson je kadro de EU-projekto. Tio estas escepto, ĉar normale ni ne trovas liberan tempon por tiaj aferoj.

5. Jam nun ni ĝojas pri la German-Nederlanda Esperanto-Kongreso en Oldenburg.

Ĉe la enirejo de la junulara gastejo en Oldenburg ni havos apartan informtablon.

Jam nun ni ĝojas pri fruktedonaj kaj kreemaj interparoloj. Veraj idealistoj estas serĉataj!

6. I.a. ni nun preparas la EU-Amikecsemajnon de la 6-a gis la 15-a de junio 2022 en Herzberg. Tio estas jam energiforrabaj labormonatoj.

Ekzemple de GEK en Oldenburgo al Herzberg ni povos ankoraŭ kunporti per nia aŭto du partoprenontojn.

Homoj, kiuj konkrete interesiĝas pri la programo ni ankoraŭ povos informi pri tio.

7. La urboadministracio de najbara urbo Bad Lauterberg aprobis dulingvan informtabulon ĉe la impona citadela ruinejo Scharzfels (inter Bad Lauterberg im Harz kaj Herzberg am Harz).

Tie ankaŭ troviĝas restoracio resp. kafejo.

8. Ni planas kaj jam ekkreas (post multjaraj antaŭlaboroj) specialan „Esperanto-esplorpadon“, por ke pli da biciklistoj kaj migrantoj povos percepti Esperanton en la „normala mondo“. Bazan koncepton „Esperanto-esplorpado“ ni jam ellaboris.

Kiu havas ideojn kaj kiu volas kunkonstrui tion kune kun ni?

Bonvenon ĉe la Esperanto-Centro en la unika Esperanto-urbo Herzberg.

Baldaŭ ni povos festi jam la 16-an naskiĝtagon de „Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo“.

Pri tio la membroj de Esperanto-Centro (EGS) povas tre fieri.

Se vi havas demandojn, bv. senpere kontakti Petron Zilvar mem.



**Esperantistoj Wilson kaj Lynn Foo el Singapuro kun Peter Zilvar, en la seminariejo de Interkultura Centro Herzberg.**

# Renkontiĝo en Bratislavo

**Komence de Majo la esperantistoj en Bratislavo invitis al la tradicia kunveno en lingva kafejo. Antaŭ la pandemio tiuj renkontoj okazis ĉiumonate. Krom esperantistoj tie kolektiĝas uzantoj de diversaj lingvoj: angla, hispana, itala, germana k.a.**

Mi alvenis tre frue, je 16:50, kiam ankoraŭ ne ĉeestis esperantistoj. Mi do aliĝis al solulo, kiu atendis por germanlingvanoj. Li rakontis pri sia vivo en Germanio kiel infano kaj pri sia studo de germanistiko en Slovakio nun.

Krome mi renkontiĝis kun Radovan, slovaka ĵurnalisto, kiu daŭre ekzercas sian germanan lingvon. Ni renkontiĝadas ekde la jaro 2016.

Post duona horo alvenis esperantistoj kaj ni kune serĉis malplenan tablon. Ni estis kvinope. Ni interparolis pri ĉiutagecoj: familioj, konatoj, sanstato. Interese, ke el la kvar slovakaj esperantistoj nur unu estis vakcinita kontraŭ koronviruso. Kontroloj pri sanstato aŭ vakcinado okazis nek en trajno, nek en gastejo.

Ekde 18:50-a horo ni esperantistoj translokiĝis per 10-minuta promeno. Ni ĝuis koncerton en koncerta salono Dvorana (halo) en strato Zochova 1, Bratislavo. La koncerton aranĝis HTF, kiu situas tie. HTF estas la Muzika kaj Danca Fakultato (slovake *Hudobná a Tanečná Fakulta, HTF*) de la bratislava Altlernejo de Muzikaj Artoj.

La koncerto estis parto de tuta ĉeno de aranĝoj, per kiuj prezentiĝas HTF. Por ni ĝi estis tute senkosta.

Flanke eblas rimarki, ke la konstruaĵo estas historie grava. Ĝis la jaro 1985 ene estis sidejo de Slovaka radioelsendejo.

Pri la koncerto: La fama ĉeĥa muzikista paro Miloslav Jelínek kaj Marcela Jelíneková ludis komponaĵojn por


La kafejo KC Dunaj.



kontrabaso kaj piano. Post paŭzo ludis la arĉ-kvarteto Mucha Quartet (la supra bildo).

Per la trajno 20:37 de Hlavná Stanica (Ĉefa Stacidomo) al direkto de Vieno mi veturis hejmen.

**Jen la datoj de la kunveno:**
Kiam: ĉiumonate la unuan merkredon de la monato, ekde la 17:30-a horo
Kie: Kafejo KC Dunaj, Nedbalova 3, Bratislavo

**Retaj informoj:**
*https://www.kcdunaj.sk/info Kafejo Dunaj*
*https://www.vsmu.sk/htf/ muzika kaj danca fakultato HTF en Bratislavo*
*http://muchaquartet.sk/ Mucha Quartet, muzikgrupo*
*https://www.goethe.de/ins/sk/de/spr/srv/scf.html Goethe-Institut, Sprachencafe*

Alfred Heiligenbrunner, 2022-05-09 ĝis -13

# UN CoPV – la pac-komitato Vieno kadre de Unuiĝintaj Nacioj

**Okazis kunsidoj de la packomitato Vieno (NGO Committee on Peace United Nations Vienna, CoPV).**

Celoj de la organizo estas tutmonda malpliiĝo de armiloj kaj tutmonda edukado al paco por infanoj kaj plenkreskuloj.

Kiel reprezentantoj de UEA partoprenadas s-ro Hans Michael Maitzen kaj Alfred Heiligenbrunner.

Komparu *http://ngocongo.org/ngo-committees » NGO Committee on Peace in Vienna.*

La kunsidoj okazis plejparte virtuale pere de Zoom.

**2021-12-01**
Univ.-Prof. Dr. Hans Karl Peterlini
„Learning and Education for the World – Limits and Perspectives".
(Lernado kaj edukado por la mondo – limoj kaj perspektivoj.)

**2022-01-26**
Komuna persona vizito de la arme-historia muzeo en Vieno (Heeresgeschichtliches Museum Wien)

**2022-02-23**
Univ.-Prof. Dr. Heinz Gärtner
"The geopolitical context of the Ukraine Crisis!"
(La geografi-politika kunteksto de la ukrainia krizo)

**2022-04-20**
Dr. Tariq Rauf
"How can the United Nations be Re-empowered to Fulfill its Peace Mission and Prevent Future Threats to World Peace?" (Kiamaniere oni povas repotencigi la Unuiĝintajn Naciojn por Plenumi sian Pacan Mision kaj Malhelpi Estontajn Minacojn al Monda Paco?)

**2022-05-18**
Dr. Afsar Rathor
"Lessons learned from the UN Peacekeeping Missions and Peace Perspectives in the Russian - Ukraine War"
(Lecionoj lernitaj de la UN Packonservaj Misioj kaj Pacperspektivoj en la Rusa - Ukrainia Milito)

(2022-05-13, Alfred Heiligenbrunner)

# Boltzmann, la germana profesoro

## Komento pri la dua legogustumaĵo de la vojaĝo de Boltzmann en la Eldoradon:

Tiu estis elektita, ĉar ĝi raportas la problemojn de la akademia komunikado por unu el la plej famaj teoriaj fizikistoj de la historio okaze de lia prelegrestado en la kalifornia Universitato de Berkeley komence de la pasinta jarcento, specife per la aparte bonhumora prezentado de Boltzmann. Li tie i.a. temigas la evidentan mankon de korespondo inter skribata kaj parolata angla lingvo, kiu eĉ hodiaŭ kondukas al problemoj en la naturscienca komunikado internacinivele, spite al la daŭre asertata solvo de la lingva problemo per la angla.

Ankaŭ tiu aspekto de la Boltzmann-a libro sugestas paradigman ŝanĝon. La publikigo de lia raporto pri lia vojaĝo al Usono en 1905 nun dulingve, do en Esperanto kaj la germana originalo ne nur unuavice servas al la informado de interesita Esperanto-publiko, sed antaŭ ĉio por demonstri la ekziston kaj la kapaciton de Esperanto por la germanlingva publiko.

**Hans Michael Maitzen,**
**2022-05-08.**

Nun mi devas konfesi, ke mi havas iomete da kulisa timo ĉiam antaŭ la unua prelego; precipe ĉi tie, kie mi parolu angle. Dumvojaĝe mi havis malpli da ebloj por angla konversacio ol mi estis esperinta. La germanoj, kiuj kapablus anglumi, post kelkaj anglaj vortoj denove parolis germane kaj la veraj angloj tute ne parolis.

Mia angla konversacio procedis laŭ jena skemo. Mi: *When lunch will be served?* (Kiam lunĉo estos servata?). Li: *ieeöö.* Mi: *I beg you, could you say me, at what hour lunch will be served?* (Mi petas vin, ĉu vi povus diri al mi, je kiu horo lunĉo estos servata?). Lia gargarado nun tutan kvinton pli malaltas: *aoouu.* Mi komprenas la fuŝecon de mia atakplano kaj krias senespere: *Lönch, lanch, lonch, launch* ktp. Mi eligas vokalojn, kiujn oni vane serĉus en la preslitera kesto de Gutenberg. Nun lia vizaĝo signalas ioman komprenon; *Ah, loanch?* Nun la ponto de

## Kommentar zur zweiten Leseprobe von Boltzmanns Reise ins Eldorado:

Diese wurde ausgewählt, weil sie die Probleme der akademischen Kommunikation für einen der bedeutendsten theoretischen Physiker der Geschichte anlässlich seines Vorlesungsaufenthaltes an der kalifornischen Universität Berkeley zu Beginn des vergangenen Jahrhunderts demonstriert und zwar in Boltzmanns besonders humorvoller Darstellung. Er spricht dabei u.a. die krasse Nichtkorrespondenz von geschriebenem und gesprochenem Englisch an, die auch heute noch zu Problemen in der naturwissenschaftlichen Kommunikation im internationalen Bereich führt, wo Englisch immer wieder als die Lösung des Sprachenproblems behauptet wird.

Auch dieser Aspekt des Boltzmann-Buches gibt zu einem Paradigmenwechsel Anlass. Die Veröffentlichung seines Reiseberichtes 1905 in die USA jetzt zweisprachig, also in Esperanto und dem deutschen Original dient nicht mehr primär bloß der Information des interessierten Esperanto-Publikums, sondern vor allem der Demonstration der Existenz und Kapazität von Esperanto für die deutschsprachige Öffentlichkeit.

**Hans Michael Maitzen,**
**2022-05-08.**

Nun muß ich gestehen, daß ich ein wenig Lampenfieber immer vor der ersten Vorlesung habe; hier gar, wo ich englisch sprechen sollte. Ich hatte auf der Reise weniger Gelegenheit zur englischen Konversation gehabt, als ich gehofft hatte. Die Deutschen, die englisch gekonnt hätten, sprachen nach einigen englischen Worten wieder deutsch und die echten Engländer sprachen überhaupt gar nichts. Meine englische Konversation ging nach diesem Schema. Ich: When lunch will be served? Er: ieeöö. Ich: I beg you, could you say me, at what hour lunch will be served? Sein Gegurgel ist jetzt um eine gute Quint tiefer: aoouu. Ich begreife das Verfehlte meines Angriffsplanes und schreie verzweifelt: Lönch, lanch, lonch, launch usf. Ich bringe

interkompreniĝo ekestis. Mi: *When? At what hour? When o'clock?* Li: *Half past one!* Ni komprenis unu la alian. Kaj nun mi donu tridek prelegojn en tiu lingvo! Mi do deklaris min por mardo, la 27a de junio, nedisponebla kaj komencis nur merkrede. Dum la unua prelego mi supozeble estis hezitema, sed je la dua jam pli libera kaj kiam mi finfine aŭdis, ke la studentoj min bone komprenis, ja trovis mian prezentadon tre klare aranĝita, jen mi do sentis min baldaŭ tute hejme.




Mi ne povas ne esprimi mian dankon pro tiu sukceso al mia angla lingvo-instruistino en Vieno *Miss* May O'Callaghan. Sen ŝiaj senlacaj klopodoj helpi al mia rezistema lango mi ĝin ne estus atinginta. Kiel fiere mi aplikis kvazaŭ nature la vortojn *blackboard* (tabulo) kaj *chalk* (kreto), kiam mi devis havigi al mi skribtaŭgan kreton kaj sufiĉe grandan skribtabulon! Kiel bone funkciis la prononcado de *algebra, differentialcalculus, chemistry, natural philosophy* ktp.!

Jes, ankaŭ elstaran omarsalaton mi dankŝuldas al mia diligenteco. Sur menukarto aperis foje *lobstersalad*. Mi tuj memoris pri la leciono, kie mi apenaŭ povis kredi, ke *lobster* staras por omaro; do alportu la *lobster*-on kaj tiu ekskvizite gustis.

El la libro „Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado“ de Ludwig Boltzmann, tradukita de Hans Michael Maitzen; paĝoj 23-25. ISBN 9788088326199.

Rimarko: Traduko en la anglan legeblas tie-ĉi: *https://homepage.univie.ac.at/walter.kutschera/Boltzmann_Reise%20ins%20Eldorado_English%20translation.pdf*

Vokale hervor, die man in Gutenbergs Setzkasten vergebens suchen würde. Jetzt zeigt sein Gesicht einiges Verständnis; Ah, loanch? Nun ist die Brücke der Verständigung geschlagen. Ich: When? at what hour? When o'clock? Er: Half past one! Wir haben uns verstanden. Und nun sollte ich in dieser Sprache dreißig Vorlesungen halten! Ich erklärte mich also Dienstag den 27. Juni außerstande und begann erst Mittwoch. Bei der ersten Vorlesung war ich wohl zaghaft, aber bei der zweiten schon unbefangener und als ich vollends hörte, daß mich die Studenten gut verstehen, ja meine Darstellung sehr übersichtlich und klar finden, da fühlte ich mich bald ganz zuhause.

Ich kann nicht umhin, meiner englischen Sprachlehrerin in Wien Miß May O'Callaghan für diesen Erfolg meinen Dank auszusprechen. Ohne ihre unermüdlichen Bemühungen meiner widerstrebenden Zunge nachzuhelfen, hätte ich ihn nicht erzielt. Mit welchem Stolze wandte ich wie selbstverständlich die Worte Blackboard und Chalk an, als ich mir schreibfähige Kreide und eine ausreichende Schreibtafel verschaffen mußte! Wie gut klappte die Aussprache von Algebra, Differenzialcalculus, Chemistry, natural Philosophy usw.!

Ja auch einen ausgezeichneten Hummersalat verdanke ich meinem Fleiße. Da stand auf der Speisekarte lobster-salad. Ich erinnerte mich sogleich der Lektion, wo ich kaum glauben konnte, daß Hummer lobster heißt; also her mit dem lobster und er mundete ganz vorzüglich.

**Hans Michael Maitzen, Reinhard Fössmeier**
**2022-03-13**

# Ursula („Ursel“) Schrapp, 1923 - 2022

En la aĝo de 98 jaroj forlasis nin Ursel Schrapp, dum jardekoj membro de GEA kaj de la fervojista Esperanto-movado.

Kun sia edzo Joachim – jam longe forpasinta – ŝi estis unu el la ĉefaj apogoj de la Esperanto-grupo Münster, vizitis kongresojn, praktikis la lingvon kaj helpis, kie ŝi povis. Siajn lastajn jarojn ŝi pasigis en domo por maljunuloj, sed daŭre venadis al la kunvenoj, restis aktiva kaj interesiĝis pri la esperantista mondo.

Ŝi estis la lasta el la postmilita generacio, kiu refondis nian grupon en Münster kaj dum multaj – foje ankaŭ malfacilaj – jaroj vivtenis ĝin. Ni kondolencas al ŝiaj gefiloj kaj ties familioj.

**Ulrich Brandenburg**



# Medienecho

**Herzlichen Dank für zugesandte Artikel und Hinweise. Bitte geben Sie bei Mitteilungen einen eindeutig identifizierbaren Absender und einen sinnvollen Betreff an, damit sie nicht im Spam Ordner landen.**

***Netzbeiträge, die nur über Angabe persönlicher Daten, per Passwort, kostenpflichtig oder nach Anmeldung zu lesen sind, sind kursiv gedruckt.***

**Auf nicht im Netz erschienene Berichte, die aber vorliegen, wird hingewiesen. Diese können Interessenten gerne als Kopie zum persönlichen Gebrauch (nur per Netzpost) zugesandt werden. Anfragen an "*medienecho@esperanto.de*" - Bitte den jeweils genannten Betreff angeben.**

**Danke**

**15. Mai 2022**
**News Reader**
Verschiedene Links zu Esperanto und Herzberg
*https://news.feed-reader.net/108399-herzberg-am-harz.html*

**7. Mai 2022**
**Fruugo**
Esperanto Schlüsselanhänger für 4,45 €
*https://www.fruugo.de/cle-cles-schlussel-brode-patch-ecusson-abzeichen-flagge-esperanto-tur/p-38232656-78457876*

**2. Mai 2022**
***Frankfurter Allgemeine***
Esperanto klingt nach einer kuriosen und sehr betagten Idee. Das Internet aber und digitale Treffen geben der Bewegung neuen Schwung. Esperantistin Anina Stecay über gerechte Sprache, putzige Fragen und Gendern in Esperanto.
30 Tage nach Anmeldung kostenfrei, danach nur mit Abo
*https://www.faz.net/aktuell/rhein-main/frankfurt/esperantisten-treffen-sich-im-netz-18000253.html*

**29. April 2022**
**Schlampermäppchen Esperanto**
Die pfiffige, kleine Geschenkidee für 4.16 €
*https://www.televis24-elektronik.de/bekleidung-bastelbedarf-schule-schreibbedarf-und-kalender/schule-schreibbedarf-und-kalender/schule/maeppchen/schlampermaeppchen/265885/schlampermaeppchen-esperanto-20-x-5-5-x-3-5-cm*

**25. April 2022**
**Radio Dreyeckland**
**Esperanto-Magazin**
gut einstündige Radiosendung
*https://player.fm/series/radio-dreyeckland-180765/esperanto-magazin-montag-25042022*

**19. April 2022**
**libera folio**
**Esperantistoj helpas defendi Odeson**
Viktor Vilĥa en Odeso kolektas subtenon por la defendo de sia hejmurbo, kaj li jam ricevis kontribuojn de esperantistoj el pluraj landoj. Sed mirigas lin, ke ekzistas ankaŭ esperantistoj, kiuj subtenas la invadon de aliaj landoj. "Tio estas por mi tute nekomprenebla afero", li diras.
*https://www.liberafolio.org/2022/04/19/esperantistoj-helpas-defendi-odeson/*

**19. April 2022**
**Geburtstagskind hat selbst sein Heimatdorf überlebt**
**Elsa Gambusch aus Braunsbedra feiert ihren 100. Ehrentag. Um so alt zu werden, sieht sie ein einfaches Rezept.**
Nach kostenfreier Registrierung lesbar (3 Artikel in 30 Tagen kostenlos lesen).
*https://www.mz.de/mitteldeutschland/saalekreis/geburtstagskind-hat-selbst-ihr-heimatdorf-uberlebt-3366223?reduced=true*

**18. April 2022**
**WDR – Zeitzeichen**
**Konferenz des Völkerbunds zu Esperanto (am 18.04.1922)**
WDR ZeitZeichen. 18.04.2022. 15:00 Min. Verfügbar bis 18.04.2099. WDR 5
"Nova mondlingvo"! Eine neue Weltsprache! Diesen Traum wollen Freunde und Verfechter der Kunstsprache "Esperanto" vor 100 Jahren Wirklichkeit werden lassen. Als Startsignal soll Esperanto in Schulen gelehrt werden.
Zu Gast bei Harald Schmitz und Présence Bouvier

*https://www1.wdr.de/mediathek/audio/zeitzeichen/audio-konferenz-des-voelkerbunds-zu-esperanto-am--100.html*
*https://www1.wdr.de/radio/wdr5/sendungen/zeitzeichen/zeitzeichen-esperanto-konferenz-100.html*
*https://podcasts.apple.com/es/podcast/konferenz-des-v%C3%B6lkerbunds-zu-esperanto-am-18-04-1922/id206817194?i=1000557859947&l=ca*

**11. April 2022**
**literaturkritik.de**
**Plansprachen als Erlösung der Menschheit**
**Clemens J. Setz erforscht die Utopie von der begrifflichen Schärfe**
Die Bienen und das Unsichtbare. Suhrkamp Verlag, Berlin 2020. 300 Seiten, 24,00 EUR.
ISBN-13: 9783518429655
*https://literaturkritik.de/setz-bienen-unsichtbare-plansprachen-als-erloesung-menschheit-clemens-j-setz-erforscht-utopie-begrifflichen-schaerfe,28762.html*

**3. April 2022**
**Esperanto in 12 Lektionen**
Vermittelt die wichtigsten 500 Wörter - Ohne Anmeldung: Einfach Start klicken - mobil-optimiert für Smartphones – kostenlos
Der Kurs besteht aus 12 Lektionen, jede davon mit - einem Lesetext - einer Grammatik-Erklärung - und 3 Übungen.
Danach kannst du das Wichtigste verstehen und Sätze bilden, um Dich grundlegend auszudrücken und zu verständigen. Probier es aus!
*https://esperanto12.net/de/*

**3. April 2022**
**Majkel.de**
**Dieses Online-Wörterbuch bietet eine alltagstaugliche** Grundlage für Gespräche und Korrespondenz, das Lesen von Zeitschriften und Büchern und die Teilnahme an Internet-Gemeinschaften, also für Situationen, in denen ein leicht verständlicher Wortschatz besonders wichtig ist. Gesucht werden kann sowohl nach deutschen Wörtern als auch nach Esperanto-Wurzeln. In Esperanto-Wörtern sind die einzelnen Teile (Wurzeln, Affixe usw.) zur besseren Verständlichkeit durch einen Punkt getrennt (z. B. mal.san.ul.ej.o - Krankenhaus). Diese Darstellung vermittelt einen Eindruck von der Leistungsfähigkeit und der Regelmäßigkeit des Wortbildungssystem.
*https://www.majkel.de/eo/*

**28. März 2022**
**Grenzecho**
**Kelmis: Die Botschaft von Amikejo in die Welt tragen**
Straßburg, Zürich, Kelmis. Die Künstlerin Valeska Peschke trägt die Botschaft von „Amikejo“, dem Esperanto-Staat in Neutral-Moresnet, in die Welt. Ihr Amikejo ist eine Utopie auf historischer Basis.
Den kompletten Artikel gibt es leider nur nach einer Bezahlschranke zum Monatsabo für mutige 11,60 Euro! Schade
*https://www.grenzecho.net/71540/artikel/2022-03-28/kelmis-die-botschaft-von-amikejo-die-welt-tragen*

**25. März 2022**
**Kie la paco ekvenas – Wo der Weg zum Frieden beginnt**
*https://www.cpdl.org/wiki/index.php/Kie_la_paco_ekvenas_(Wo_der_Weg_zum_Frieden_beginnt)_(Krysztof_Daletski)*

**24. März 2022**
**Luis Enrique Sepúlveda Cuadra**
(geboren 9. Oktober 1873 in Valparaíso; gestorben 30. Oktober 1935) war ein chilenischer Blinden- und Taubstummenlehrer und Übersetzer aus dem Französischen, Englischen, Italienischen und Portugiesischen ins Spanische sowie ein bedeutender Esperanto-Pionier in Südamerika und Mitglied des Sprachausschusses.
*https://de.wikipedia.org/wiki/Luis_Enrique_Sep%C3%BAlveda_Cuadra*

**21. März 2022**
**Grenzecho**
**Ausstellung in Kelmis: Gedanken zum Ort der Freundschaft Kunst**
Eine Ausstellung mit Werken der Berliner Künstlerin Valeska Peschke im Museum Vieille Montagne wird sich ab dem 26. März mit der Esperanto-Vergangenheit von Kelmis auseinandersetzen. Den kompletten Artikel gibt es leider nur nach einer Bezahlschranke zum Monatsabo für sage und schreibe 11,60 Euro! *https://www.grenzecho.net/71194/artikel/2022-03-21/ausstellung-kelmis-gedanken-zum-ort-der-freundschaft*

# 38-a PSI denove okazis nur virtuale, kiel PSI-eto, de la 15-a ĝis la 17-a de aprilo 2022



**La ĉi-jara, 38-a PSI (Printempo Semajno Internacia), origine planita en Braunschweig, denove devis esti nuligita pro la koronvirusa situacio kaj – pli grava – pro la manko de aliĝoj ĝis la komenco de februaro 2022.**

Pro tio la 38-a PSI nur povis okazi virtuale kiel PSI-eto. La nombro de partoprenantoj variis de 9 ĝis 14, inter ili ĉiam kelkaj PSI-teamanoj. Por la PSI-teamanoj kaj la program-kontribuintoj tio estis sufiĉe seniluziiga.

Ankaŭ ĉi-jare la programo de la PSI-eto abundis per ludoj, origamio, prelegoj kaj infanaj horoj.

La unuaj minutoj je la vespero de la Sankta Vendredo estis dediĉitaj por la interkonatiĝo kaj por la rememoro al nia amiko Wolfgang Bohr, kiu estis Esperanto-aktivulo kaj longjara PSI-organizanto. Poste ni komune ludis ĝis la noktomezo la konatan ludon „samopiniulo“ kun Klaus Rumrich, dum kiu oni devas provi pensi kiel la plimulto de la kunludantoj.

La Paska Sabato komenciĝis per infana horo. Dum ĝi ni ĝuis la spektaklon de la „eta cirko“ kun la mirinda kaj konata pupludisto Christoph Frank. Kiel cirkestro li prezentis dancantajn ananasojn, elefant-piramidon, grimpantan leonon kaj multajn aliajn atrakciojn. La sabata posttagmezo staris ne nur sub la signo de origamio, bonege prezentita de la ĉarma Zoja Haŭmer. Poste François Hounsounou, aktiva Esperanto-parolanto el Benino en Afriko, konatigis nin kun la vivo de la fama benina verkisto Jean Pliya, kiu ne nur skribis multajn librojn pri la resanigo per plantoj, ricevinte kelkajn premiojn, sed ankaŭ partoprenis en la politikaj kaj administraj aktivecoj por la sendependeco de Benino. Sekvis prezentadoj pri la venontjara 39-a PSI en Vitenbergo kaj ĝiaj ekskurseblecoj. La 39-a PSI okazos de la 3-a ĝis 10-a de aprilo 2023, aliĝo jam eblas ĉe *https://psi.esperanto.de/2023*.

Paula Weil prelegis kaj klarigis al ni, kion signifas kaj kio necesas por „klimata justeco“.

Pri novaĵoj de la Asocio Nova Familio Goma, Kongo-lando, sciigis nin Betti Maul. En la sekvanta diskuto oni eksciis pri subteneblecoj kaj bezonaĵoj de la infanoj tie. Krome Betti rakontis pri la malfacilaĵoj ĉe la akiro de subtenantaj rimedoj kaj duboj pri la uzo de la almoza mono. Dum la sabata vespero ni ludis la ludon TABUo (unu kontraŭ la aliaj), gvidita de Betti kaj Klaas.

En la Paska Dimanĉo atendis nin Christoph kaj Ines Frank kun eta surprizo. Christoph komencis per rakontoj, brile voĉlegitaj, el la libro „Winnie-la-Pu“, subtenitaj de kelkaj bildoj. Inter la rakontoj okazis la virtuala ovoserĉado, ĉarme aranĝita de Ines Frank en sia/ilia loĝoĉambro.

La posttagmezajn sinsekvojn de prelegoj malfermis Amri Wandel el Israelo. Li rakontis pri la historio de spacteleskopo Hubble, ĝis ĝia multe pli potenca daŭriganto James Webb, kaj montris al ni multajn bildojn de spac-teleskopaj rigardoj en la spacon. Post tio ni rerigardis al la tempo de roma imperio kaj kiel ili kalkulis per romaj ciferoj, prezentita de Klaus Rumrich kun multaj kalkulekzemploj. Kun Andreas Diemel ni vojaĝis en la estontecon dum la prezentado pri la esploranta koncepto/teĥniko de „Hyperloop“. Ĝi estas transporta sistemo, kiu uzas aerpreman tubon, en kiu moviĝas la vagonoj por varoj kaj personoj. La ĉi-jara 38-a PSIeto finiĝis per ludoj kaj viglaj babiladoj, kiel la neatenditaj rakontoj de Franĉesko el Italio, kiu interese parolis pri sia urbo Como kaj la lago Como en la norda Italio.



Bildo © Tourist-Information Lutherstadt Wittenberg / WittenbergKultur e.V.

**Ni esperas revidi vin en 2023 en Vitenbergo, Saksio-Anhalto!**

**Aliĝo jam eblas ĉe:**
*https://psi.esperanto.de/2023*

**Ralf Haŭmer**
**kaj Stefan Krieghoff**
**en la nomo de la PSI-Teamo**

# Estimataj samideanoj,

**Saluton! Mi estas Pastoro Bukuru Ruburaga Nabahena, loĝanta en Kiliba/Uvira/DR Kongo, kie mi agadas per eta Esperanto-movado.**

Mi tutlande vartas junan kaj modestan kristanan/protestantan Kirkon en nia lando. La Kirko nomiĝas franclingve: *Église des Messagers de Dieu (EMD)*/(Eklezio de Mesaĝantoj de Dio), kaj ĝi estis fondita de grupeto de kristanaj esperantistoj en la jaro 2002. Tiu lasta havas Esperanto-servon, kiu, cetere, estas antaŭvidita en nia kirka Interna Regularo, nome: "EMD-a Esperanto-Servo (EES)". La juran agnoskon jam akiris nia Kirko el nia ĉefurbo Kinŝaso.

Antaŭ du monatoj nia Esperanto-servo lanĉis etan projekton kadre de diskonigo kaj disvastigo de Esperanto en nia regiono. Temas pri eta loka, juna futbalteamo, nome: „FC Esperanto-Kiliba“. Tiuj junuloj ludas pilkon kaj samtempe lernas Esperanton 2-foje semajne. Entute ili estas pli-malpli 20 kaj havas inter 12 kaj 15 jarojn, kaj ili tre interesiĝas pri la Internacia Lingvo. La futbalteamo estas oficiale agnoskita de nia loka sporta ministerio.

El tiu futbalgrupeto mi planas fari pli multe: Unuaflanke, kadre de la lernado kaj praktikado de la lingvo, mi intencas fari publikajn aktivecojn, kiel promeni kun ties teamanoj/ludantoj, interparolante Esperanton, por ke neesperantistoj vidu la verdan aferon kaj laŭeble estu altirataj al ĝia lernado, ktp. Aliflanke, kadre de la utiligado de Esperanto per konkretaj socihelpaj agadetoj, kiel etaj subtenoj al tiuj malriĉaj junuloj, rilate iliajn studadojn (disdono de skribiloj, kajeroj, uniformoj, ktp).


REPUBLIQUE DEMOCRATIQUE DU CONGO
MINISTERE DE SPORT ET LOISIRS
PROVINCE DU SUD-KIVU
TERRITOIRE D'UVIRA
CITE DE KAGANDO-KILIBA
GROUPEMENT SPORTIF DE KILIBA – ONDS

CERTIFICAT DE L'AUTORISATION SPORTIVE

Je soussigné, AMANI BAZIKA, Président du Groupement Sportif de Kiliba-ONDS, atteste par la présente que le Club footballistique local dénommé : « FC ESPERANTO KILIBA », a droit à faire les activités footballistiques dans l'entité de Kiliba.

Fait à Kiliba, le 23/10/2021

Accord Cercle Sportif UVIRA — Accord Chef de Cité — AMANI BAZIKA, Président du Groupement

Por sukcesigi ĉion ni bezonas kunlaborantojn. Ekzemple mankas al la E-teameto necesaj ludmaterialoj, interalie: ludbluzoj, ŝuoj kaj pliaj pilkoj.

Ni do alvokas vin memvole vidi, kiamaniere, eĉ modeste, vi povas subteni tiun projekteton per donac(et)oj, kiuj ebligu ĝian fortiĝon kaj sukceson. Nia peranto estas samideano Ronald Schindler (Germanio), kontaktebla ĉe: *ronaldschindler@web.de.*

Viajn bonkorajn reagojn atendante, nome de nia Kirko kaj de nia Esperanto-Servo, mi bondeziras ĉion plej bone al vi !

Plejestime kaj movade via,
Pastoro Bukuru R Nabahena,
Fondinto kaj Landa Reprezentanto de
EMD Kirko en DR Kongo.

P.S.: Mia UEA-kodo: buna-b – kaj mi estas membro de UEA ĉi-jare. Antaŭdankon pro viaj donac(et)oj kaj Dio vin benu abundege!



# EU-Zukunftskonferenz und Esperanto

### Konferenz hat ihren Abschlussbericht vorgelegt *(https://futureu.europa.eu /pages/reporting)*.



In den Empfehlungen der Konferenz wird Esperanto nicht erwähnt. In Vorschlag 48 zu Kultur und Austausch wird die „Förderung der Mehrsprachigkeit als Brücke zu anderen Kulturen von einem frühen Alter an" angeregt. Die Einrichtung einer Institution zur Förderung der Sprachenvielfalt auf europäischer Ebene sollte in Betracht gezogen werden. Die Mitgliedstaaten werden aufgefordert, das Erlernen der Sprache der unmittelbar benachbarten EU-Mitgliedstaaten in Grenzgebieten und die Erreichung eines zertifizierbaren Standards in englischer Sprache zu fördern. Das soll den europäischen Bürgerinnen und Bürgern die Kommunikation mit größeren Gruppen ihrer europäischen Mitbürger erleichtern und den europäischen Zusammenhalt stärken. – Insgesamt keine wirklich überraschenden Empfehlungen; von Mehrsprachigkeit, Nachbarsprachen und Englisch hat man seitens der EU schon mal gehört.

Esperanto wird nur in einem Anhang erwähnt, im Bericht des italienischen Bürgerforums zu dem Thema; allerdings ist die dortige Bemerkung, der Traum von Esperanto habe sich nicht erfüllt (auf Englisch: er sei „collapsed"), nicht besonders aufmunternd. Jedenfalls für die Esperanto-Sprecherinnen und -Sprecher haben sich eine Reihe von Träumen durchaus erfüllt: Man kann Esperanto weit schneller lernen als andere Sprachen (in etwa einem Viertel der Zeit) und man muss sich nicht mit Unregelmäßigkeiten herumschlagen. So hat man eine realistische Chance, noch vor dem Lebensende den Zustand zu erreichen, dass man Esperanto-Texte praktisch vollständig erfassen kann (während man im Englischen und in anderen Fremdsprachen auf Dauer irgendwelchen noch unbekannten Wörtern begegnet). Die Chance, selbst korrekte Esperanto-Texte zu schreiben, ist auch deutlich besser als in anderen Fremdsprachen. Man findet eine Esperanto-Originalliteratur, die angenehm international ist und nicht zu mehr als 90 % von Muttersprachlerinnen und Muttersprachlern geschrieben wird wie beim Englischen und anderen nationalen und ethnischen Sprachen; so entgeht man ein wenig dem Kulturimperialismus, der mit der Verbreitung des Englischen als internationaler Sprache einhergeht.
Man kann Esperantosprecher in mittlerweile über 120 Ländern weltweit finden und sich an Esperanto-Büchern, Zeitschriften, Liedern sowie internationalen Veranstaltungen erfreuen. Für vermutlich ein paar hundert Leute ist Esperanto mittlerweile zur Hauptsprache geworden, die sie mehr nutzen als ihre anderen Sprachen.

So richtig überraschend ist es natürlich nicht, dass Esperanto nicht in den Abschlussempfehlungen gelandet ist - trotz der vielen Vorschläge dazu auf der entsprechenden Internet-Plattform, von denen einige zu den am meisten unterstützten in ihrem Themenbereich oder sogar insgesamt gehören. Schließlich haben sich wesentliche Teile der Bevölkerung und auch der in Europa Aktiven zum Thema Esperanto einen Bären aufbinden lassen. So glaubt etwa ein Sprecher der EU-Kommission anscheinend tatsächlich, das Esperanto habe keine Kultur – ein Irrtum, den er mit vielen seiner Kolleginnen und Kollegen teilt, wie man aus privaten Gesprächen weiß. Im französischen Erziehungsministerium nahm man zumindest bis vor wenigen Jahren irrtümlich an, Esperanto sei keine Muttersprache. Insgesamt kursieren so etwa anderthalb Dutzend falsche Gerüchte zu Esperanto, und die Basisregel lautet, wenn jemand etwas Negatives zu Esperanto sagt, dann beruht das gewöhnlich auf Falschinformation. Gelegentlich hat diese große Menge an Irrtümern – und vermutlich die Tatsache, dass man die eigene Muttersprache oder eine bevorzugte Fremdsprache als durch Esperanto bedroht ansieht – anscheinend sogar regelrechten Hass zur Folge. Bei Facebook findet sich eine Gruppe „Esperanto Haters" und sehr weit ist der Anglist Anatol Stefanowitsch davon auch nicht entfernt, der in einem Blog mal über „das leidige, nicht tot zu kriegende Esperanto" geschrieben hat, „das es weltweit auf eine schlappe Million Sprecher/innen bringt".

Der Glaube an das Englische ist im Wesentlichen damit zu erklären, dass die Betreffenden das Esperanto nicht ausreichend kennen und ebensowenig die Probleme mit Englisch. Englisch ist – nach sehr großem Aufwand – ohne Zweifel zufriedenstellend zu verwenden. Allerdings ist der Aufwand für den Nordwesten der EU deutlich geringer als für den Süden und Osten, wo die Sprachen erheblich weiter vom Englischen entfernt sind. So ist es nicht erstaunlich, dass Niederländer, Schweden und Dänen zu etwa 85 – 90 % Englisch beherrschen, während in neun EU-Ländern nur 20 – 35 % des Englischen ausreichend mächtig sind: Portugal, Spanien, Italien, Polen, Tschechien, Slowakei, Ungarn, Rumänien und Bulgarien. Wie bei einer solchen Ausgangslage eine europäische Öffentlichkeit sinnvoll und demokratisch miteinander auf Englisch kommunizieren soll, bleibt eher unklar. Ebenso sollte man sich keinen Illusionen hingeben, was die Veränderbarkeit anbetrifft: In Brüssel schwankte die Zahl derjenigen, die Englisch beherrschen, im Zeitraum 2001 bis 2018 nach vier Einzelerhebungen im Bereich von 30 bis 35 %, ohne Tendenz (*https://www.briobrussel.be/node/14776*).

Empfehlungen werden nicht dadurch besser, dass man sie schon in der Vergangenheit hatte, wo sie auch nicht gewirkt haben.

**Lu Wunsch-Rolshoven**

# Esperanto – amikoj tutmonde

Germana Esperanto-Kongreso
Deutscher Esperanto-Kongress

GEK 100
1906–2023

**Braunschweig**
**26-a ĝis 29-a de majo 2023**

▶ Postkongreso (ĉefe turisma): ◀
poste ĝis la 2-a de junio 2023



## Unua informilo

## Kio kaj kie estas Braunschweig


© Heinz Kudalla, Braunschweig

Braunschweig [braŭnŝvajk] estas urbo kun proksimume 249.000 loĝantoj en la sudoriento de la germana federacia lando Malsupra Saksio (Niedersachsen). Ĝi estas centro de la regiono oriente de Hanovro kaj post ĝi dua urbo laŭ grandeco de Malsupra Saksio.

La skribita historio de Braunschweig komenciĝis en la 8-a jarcento. Ĝi apartenis kiel unu el la plej gravaj urboj al la komerca ligo Hanso en la mezepoko, sed ne povis daŭrigi tiun ĉi gravecon. Unu kaŭzo estis la geografia situacio inter Hanovro kaj Berlino kiuj ambaŭ kreskis pli rapide. Dum la lastaj pli ol cent jaroj Braunschweig estis industria centro. Hodiaŭ la sciencoj kaj la edukado estas pli elstaraj.

La urboj Braunschweig, Wolfsburg kaj Salzgitter kunlaboras komunume kaj formas unu el la regionaj centroj de Malsupra Saksio.

En la jaro 1906 Karl Wallon fondis la unuan Esperanto-grupon en la urbo. Samjare okazis la 1-a Germana Esperanto-Kongreso in Braunschweig, poste denove la 50-a (1972) kaj la 84-a (2006).

## Kiel veni al Braunschweig

**Per trajno** ĝis Braunschweig Hbf. (ĉefstacio), de tie sur kajo C per tramo M1 en la direkton Wenden ĝis haltejo "Am Wendentor" (12 minutoj), ĉe la trafiklumo trans la straton al la junulargastejo (dekstre).

**Per longdistanca buso:** La haltejo por longdistancaj busoj situas en la strato Berliner Platz 1d, apud la ĉefstacio. De tie kiel supre.

**Per aŭto:** Vidu en www.esperanto.de/eo/gek2023 ▸ Alvojaĝo
**Parki:** rekte ĉe la junulargastejo dekstren en la ludstraton „Geiershagen“, la parkejeto situas post 50 m dekstre (16 lokoj).

**Per aviadilo:** Flughaveno: Hannover (HAJ) – distanco al Braunschweig: 70 km
per trajno al Braunschweig ĉefstacio, de tie kiel supre.
Vidu en www.esperanto.de/eo/gek2023 ▸ Alvojaĝo

## La kongresejo


© DJH Braunschweig

Prelegoj, laborgrupoj, kunsidoj kaj aliaj programeroj okazos ĉefe en la seminariaj salonoj de la **junulargastejo Braunschweig**. Tie estos ankaŭ la libroservo kaj la kongresa oficejo.

La junulargastejo situas centre kaj proksime al la universitato. La urbocentro estas piede atingebla en malmultaj minutoj. En tuja proksimeco trovigas tramhaltejo.

Ĉar la ĉefa parto de la programo okazos en la seminariaj salonoj de la junulargastejo, ni rezervis tie ĉiujn loĝĉambrojn.

Centra renkontejo kaj kongresa adreso estas la junulargastejo:
Jugendherberge • Wendenstraße 30 • 38100 Braunschweig • +49 531 8668850.

GEK 2023 · 1-a informilo

### La junulargastejo

Vi povas mendi tranoktojn kune kun via aliĝo. La ĉambroj povas laŭbezone esti uzataj kiel 1-litaj, 2-litaj aŭ plurlitaj ĉambroj. Loĝado en la junulargastejo inkluzivas tri manĝojn tage. Ŝlosebla biciklejo disponeblas en la junulargastejo.

**Atentu:** La nombro de litoj/ĉambroj estas limigita. Ni disdonos ĉambrojn laŭ la vicordo de aliĝoj.

### Ĉefkongreso + postkongreso

| ĉefkongreso | | | postkongreso | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **vendredo** 2023-05-26 | **sabato** 2023-05-27 | **dimanĉo** 2023-05-28 | **lundo** 2023-05-29 | **mardo** 2023-05-30 | **merkredo** 2023-05-31 | **ĵaŭdo** 2023-06-01 | **vendredo** 2023-06-02 |

La **ĉefkongreso** estas la kerna kongresa aranĝo kaj enhavas asociajn kaj fakajn kunvenojn, prelegojn kaj laborgrupojn pri interesaj temoj, ampleksan libroservon, regionan ekskursan programon kaj kulturan programon.

La **postkongreso** estas malpli formala kaj pli turisma aranĝo. Ankaŭ ĝi enhavas prelegojn kaj laborgrupojn pri interesaj temoj, ĉiu-tagan regionan ekskursan programon kaj kulturan programon.

Por **detalaj informoj** regule aktualigotaj pri programo kaj ekskursoj vidu ĉe www.esperanto.de ▸ Germana Esperanto-Kongreso ▸ Programo

### La kotizoj por ĉeesta programo

La kotizo indikita maldekstre validas por A-landanoj. La reduktitan kotizon dekstre pagu akompanantoj / partneroj, handikapuloj, personoj sen propra salajro.

| aliĝperiodo | ĝis 2022-06-30 | ĝis 2022-12-31 | ĝis 2023-03-31 | poste aŭ surloke | taga bileto** |
|---|---|---|---|---|---|
| **ĉefkongreso*** | 50 / 30 € | 75 / 45 € | 85 / 60 € | 105 / 85 € | 55 / 45 € |
| **kompleta kongreso*** | 100 / 60 € | 150 / 90 € | 170 / 120 € | 210 / 170 € | – |

* prezoj por ĉiu persono
** Tagbiletoj haveblas nur surloke, neniu rabato, krompago 15 / 10 €.

**Krompago** de 30 / 20 € por ne-membroj de Germana Esperanto-Asoccio loĝantaj en Germanio
**Rabato** de 30 / 20 € por partoprenantoj el B-landoj.

### Loĝado kaj manĝoj en la junulargastejo

La ĉambroj estas kvarlitaj. Kun krompago ili uzeblas ankaŭ kiel unu- aŭ dulitaj ĉambroj. Partoprenantoj, kiuj volas uzi komunan ĉambron, devas aliĝi aparte.

La prezoj inkluzivas tranoktadon, manĝojn matene, tagmeze kaj vespere (de vespermanĝo vendreda ĝis tagmanĝo lunda), litaĵon, unu kompleton da mantukoj.

La kotizo indikita maldekstre validas por aĝo ekde 27 jaroj, la dekstra por aĝo ĝis 26 jaroj.

| **ĉambrokategorio** | unulita | dulita | tri- aŭ kvarlita |
|---|---|---|---|
| **ĉefkongreso*** | 260 / 230 € | 210 / 180 € | 180 / 150 € |
| **kompleta kongreso*** | 580 / 530 € | 460 / 410 € | 370 / 320 € |

* prezoj por ĉiu persono

**Atentu:** La nombro de litoj / ĉambroj estas limigita. Ni disdonos ĉambrojn laŭ la vicordo de aliĝoj. Mendo de lokoj en la junulargastejo validas nur post konfirmo de la organiza teamo.
Ĉar la ĉambroj estas kvarlitaj, partoprenantoj povas interkonsenti inter si pri komuna uzo de ĉambro. Tio devas okazi proprainiciate kaj vi devas informin nin pri tio en via aliĝo.

### Hoteloj

Ekzistas listo de hoteloj en la ĉirkaŭo de la junulargastejo. Ĝi enhavas adreson, telefonnumeron kaj piediran distancon al la kongresejo; ligita mapo montras la ĝustan vojon. La listo de hoteloj troviĝas en la retpaĝo www.esperanto.de/eo/gek2023 ▸ Loĝado

### La organizan teamon vi atingas per:

Deutscher Esperanto-Bund e.V.
Franz Kruse
Elsflether Weg 3
27809 Lemwerder

Telefono: +49-421-6979958 (ene de Germanio ankaŭ: 0800-3363636-61)
Fakso: +49-421-678696
Retpoŝto: gek@esperanto.de

### Kiel aliĝi?

**Aliĝo per la reto**
Se iel eble, uzu la retan aliĝilon:
**https://www.esperanto.de/eo/gek-2023-alighilo**

**Aliĝo per poŝto**

Deutscher Esperanto-Bund e.V. • Brigitte Kranz • Langenweg 176 • 26125 Oldenburg

**Pago**

**Bonvolu pagi nur post ricevo de la fakturo al la konto indikita tie.**

Aliĝoj ekvalidas nur per pago de la kompleta kotizo.

**Retpaĝo kun aliĝilo kaj ĉiuj informoj pri la Germana Esperanto-Kongreso 2023**

**www.esperanto.de/eo/gek2023**

© Germana Esperanto-Asocio r.A. 2022

## Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj

Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej

### NI KORE INVITAS VIN PARTOPRENI EN LA JUBILEA 10-A EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ 2022

**Ĝis la 30-a de junio – provaŭdo rete**

**La 23-an de julio – KONCERTO DE LA PREMIITOJ kaj anonco de rezultoj – Plac Solidarności 1/3/5 aŭlo, ĉambro 403/1, 4-ra etaĝo (ekde la 14:00)**

**En la programo ankaŭ**
**JOMO kaj SUZANA kaj dancgrupoj Gracje kaj Espero**

**La premioj estos aljuĝitaj por unuaj tri lokoj.**
**Plie la Ĉefpremio, Aŭtora-premio kaj Publik-premio**

Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej · Eurokka · Radio KSON · Ilei · Rotary Club de Esperanto - Brasil · UEA · Juna Amiko

**VROCLAVO** urbo de renkontiĝoj
Honora Patronado de la Prezidanto de Vroclavo

**Ĉiaj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso : festivalo.eo@gmail.com (skribu en la temo de la mesaĝo: E-kanto) aŭ telefone +48 692 551 131, +48 606 858 640,**
**www.ecem.com.pl / https://www.facebook.com/efekantoj/**

# Programo de la 11ª Kultura Esperanto-Festivalo, Ĉaŭdefono 9-15 aŭgusto 2022

**Mardon la 9an: alvenoj, urbovizito (per la blanka vagonareto), unua vespermanĝo. Dum la postaj tagoj laŭ la suba kadenco kaj agendo.**

| PREZENTARO 9h15 (salono aŭ lokalo) | MATINEO 14h30 (salono aŭ lokalo) | DIVERSE 16h00 (salono aŭ lokalo) | VESPERUMO 20h30 (salono aŭ lokalo) | |
|---|---|---|---|---|
| **inaŭguro** (salono Lazaro)<br>kun instrumentaj intermezoj<br>recitalo de **Anjo Amika** | **Jean-Thierry von Bueren**<br>koncerto kun fortepiano<br>(Societo de Amikeco) | kino (salono Lazaro)<br>**aŭ** slojdo kun Ĉaro (Edmondo)<br>**aŭ** vizito de la **framasona loĝio** | **Jonny M**<br>en koncerto<br>(salono Lazaro) | **10** |
| **jogo** kun **Patrick** (Hektoro)<br>aŭ **masaĝo** kun **Katalin** (Roksano)<br>— — — — — — — — — — —<br>***Literatura Foiro***<br>Perla **Martinelli**, Alessio **Giordano**<br>(salono Lazaro) | **Giuliano Turone**<br>reĝisoro kaj aktoro en<br>***Danto poligloto***<br>kaj de Anton Ĉeĥov<br>***Pri la malutilo de la tabako***<br>(salono Lazaro) | kino en esperanto<br>(salono Lazaro)<br>**aŭ** slojdo kun Ĉaro<br>(ĉambro Edmondo)<br>**aŭ** ekskurso al Neŭŝatelo<br>prelego de Boursicot? | **Sepa Asorti**<br>en koncerto<br>(salono Lazaro) | **11** |
| **jogo** kun **Patrick** (Hektoro)<br>aŭ **masaĝo** kun **Katalin** (Roksano)<br>— — — — — — — — — — —<br>prezento pri<br>**PEN-Klubo Internacia**<br>(salono Lazaro) | ateliero de **tabloludoj**<br>(ĉambro Roksano)<br>**aŭ** kanti kun **Kajto**<br>(salono Lazaro)<br>**aŭ** ateliero de **pupfarado** (pupteatro de La Turlutaine) | vizito de la **Horloĝa Muzeo**<br>**aŭ** kino (salono Lazaro)<br>**aŭ** slojdo kun Ĉaro<br>(ĉambro Edmondo) | **Kajto**<br>en koncerto<br>(salono Lazaro) | **12** |
| **jogo** kun **Patrick** (Hektoro)<br>aŭ **masaĝo** kun **Katalin** (Roksano)<br>— — — — — — — — — — —<br>ronda tablo pri la<br>esperanta kulturo en la 2020aj<br>(salono Lazaro) | ateliero de **tabloludoj**<br>(ĉambro Roksano)<br>**aŭ** kanti kun **Kajto**<br>(salono Lazaro)<br>**aŭ** ateliero de **pupfarado**<br>(pupteatro de La Turlutaine) | vizito de la **sinagogo**<br>**aŭ** kino (salono Lazaro)<br>— — — — — — — — — — —<br>teatro: ***Invit' al njugatesko***<br>de Giorgio **Silfer**<br>(pupteatro de La Turlutaine) | **Chiara Raggi**<br>en koncerto<br>(salono Lazaro) | **13** |
| **jogo** kun **Patrick** (Hektoro)<br>aŭ **masaĝo** kun **Katalin** (Roksano)<br>— — — — — — — — — — —<br>lumbilda vojaĝo ĉirkaŭ la mondo<br>prelego de **Florence Sans**<br>(salono Lazaro) | **Anjo Amika**<br>en dimanĉa koncerto<br>(najbara preĝejo) | vizito de la **islama muzeo**<br>**aŭ** kino en esperanto<br>— — — — — — — — — — —<br>orienta ventrodanco<br>de Paola **Tosato**<br>(salono Lazaro) | **JoMo**<br>en koncerto<br>(salono Lazaro)<br>**komuna adiaŭo** | **14** |
| | **Naturamika tuttaga ekskurso, kun piknikaĵo** (aparta kotizo) | | | **15** |



**Kultura Esperanto-Festivalo**



**La Chaux-de-Fonds (Svislando) 9-15 aŭgusto 2022**

Programkotizo: 100,- CHF.
Tag- aŭ vespermanĝo: 20,- CHF (tage/persone)
Tag- plus vespermanĝo: 35,- CHF (tage/persone)
Tranoktado (tage/persone):
festivalejo: 45,- CHF
kampadejo: 35,- CHF
gastejo: 30,- CHF ?

**ALIĜILO AL KEF 2022**

Mi aliĝas al KEF. Mia nomo: ________________________. Mia retadreso: _________@________ stratadreso: __________________ kodo kaj urbo: ________________ lando: _____ tel._______________

Mi ŝatus kontribui per ĉi tiu programero: ________________ ________________________.

Mi pagas la programkotizon al IBAN **CH23 09000000230029218** por Kultura Centro Esperantista, Svislando.

Mi deziras tranoktadi de la ___a vespere ĝis la ___a de aŭgusto matene en __________________ kaj mi mendas manĝojn de la ___a ĝis la ___a de aŭgusto.

Mi alvenos per trajno / aŭto al Ĉaŭdefono la __an de aŭgusto je __h__. Dato kaj subskribo: ________________________

## Alvoko por eksterordinara subteno



La lastaj luintoj de du apartamentoj kaŭzis gravan damaĝon, kiu akcelis la neceson funde flegi la internon de la Esperanto-Domo.

Tio signifas eksterordinaran elspezon de almenaŭ 20.000 CHF, kio malekvilibrigus la buĝeton de KCE. Por redukti la problemon ni alvokas niajn geamikojn al ekstra subteno, krom la kutima donaco aŭ apogo. Ekzemple, se vi pensis heredigi sumon al KCE en fora tempo, nun estus tre oportune anticipi parton.

Plej kore antaŭdankas

**la Komitato**

**Respondis al la eksterordinara alvoko: fondumo Pro Esperanto 800,-. Marie-France Conde Rey 500,-. Perla Martinelli 500,-. Giorgio Silfer 500,-. Memore pri Antonio D'Orazio, Franco Levi, Giancarlo Mangini 300,-.**
**Bonvolu ĝiri al IBAN: CH23 09000000230029218. Motivo: KCE-alvoko.**

## Kial tiom da gitaroj

Gitaro estas la ĉefa instrumento de niaj muzikistoj, pro almenaŭ du historiaj kaŭzoj.

La esperanta muziko plej disvolviĝis ekde la 1970aj, koincide kun la invento de la kasedo: ĝuste en 1977 aperis samtempe *La vojo* de Gianfranco Molle kaj *Tra l' mondo* de Olivier Tzaut. Tiu epoko idis el la 1960aj, kiam gitaro fariĝis tre populara en la mondo.

Tiu populareco rilatis ankaŭ al la temaro de la tiamaj kanzonistoj, ofte pacifisme protesta. Kaj por armea aŭ milita muziko oni uzas perkut- kaj blovinstrumentojn: tamburo, trumpeto, fifro. Tre malofte aperas kordinstrumento: la plej fama estas Radetzky-marŝo, kie la orkestron gvidas violonisto.

Oni povas diri ke kordaj estas la instrumentoj de paco. Provu ludi la himnon *La Espero* per latunaj muzikiloj kaj tamburo: ĝi sonoras tre militalvoke. Ludu ĝin per violona akompano: la efekto estas tute alia. Ne hazarde gloso al la Konstitucio de la Esperanta Civito rekomendas uzi violonon aŭ fluton por la himno, kiun la artikolo 6 oficialigas.

Sed en ĉio eblas esceptoj: ekz. la gurdo de Nikolin' kaj la akordiono de Kim Henriksen.

**Tria vizito de Marie-France Conde Rey en Afriko. La emerita Konsulino gvidas staĝon pri metodiko de la E-instruado al deko da aktivuloj ĉe la Tanganika E-Domo, 2-7 majo 22.**

**La staĝo inkluzivas retrospektivon pri la instrumetodoj (bazitan sur la studoj de István Szerdahelyi), selekton de lerniloj, utiligon de komiksoj, preparon de lingvotestado, esploron en biblioteko.**

**La iniciato estas organizita de Afrika E-Instituto kaj grandparte financata de la Esperanta Civito, danke al la sponsorado de KCE.**

**Afrika Centro Esperantista en Lomeo promesis kunlaboron sed faris nenion, eĉ perdis la ŝancon de stipendio por togolandano.**

## Donacis ĝis aprilo

**por Afrika E-Instituto**
***kaj Tanganika E-Domo:***
Giorgio Silfer 160,-. Jacqueline Lépeix 8,00. Klaus Perko 6,40.

*La luo de la duetaĝa Tanganika E-Domo kostas 160,- CHF monate.* ***(grase la voĉrajtaj Apogantoj)***




***por Kultura Centro E-ista:***
Jordan Aikins 25,-. Miriam Altemani 50,-. Gabriel Barta 10,-. Jean Biollay 5,-. Charlotte Blanc Maillard 20,-. Manuela Blanco 10,-. David Buhlmann 120,-. Joseph Chalverat 100,-. **Marie-France Conde Rey** 180,-. Françoise Cork 50,-. Claude Gacond 20,-. Alessio Giordano 21,-. Claudio Gobbo 50,14. Bruno Graf 25,-. Rolf Gygax Helfenstein 50,-. Julio Herrero 25,- **Esperanta Naturamikaro** 360,-. **Esperanta PEN-Centro** 360,-. **Feminisma Esperanta Movado** 360,-. Georges Haldimann 20,-. Yvette Humbert Fink 50,-. **Riichi Karibe** 200,-. **Stan Keable** 180,-. **Kooperativo de Literatura Foiro** 360,-. Giuseppe Lalli 20,28. Eliane Lavanchy 110,-. **Perla Martinelli** 180,-. Feri Mazlum 50,-. Edouard Muster 30,-. **Bertil Nilsson** 180,-. Luciano Ortelli 30,-. Nino Pala 25,- Lilli Papaloizos 20,-. Dieter Rooke 10,-. Daniel Rotacher 100,-. **Giorgio Silfer** 180,-. Maria Wenczel Staeuble 30,-. Noelle Weyeneth 30,-.

**Sendi al vi ekzempleron de *Heroldo de Esperanto* kostas unu frankon/eŭron. Aldonu la preskoston kaj nian (sensalajran) laboron. Adekvata donaco al KCE estus justa helpo.**

## KCE-programo 2022

**14-18 aprilo**
***8a Lingva Kolokvo***
*Inter dulingvismo kaj diglosio, inter adopta kaj denaska lingvo*
prelegoj kaj debatoj
Asembleoj de KCE kaj de LF-koop

**19-24 julio**
***3a staĝo pri diplomatia tradukado***
gvidas d-ro Giorgio Silfer
specife pri Eŭropa Unio

**26-31 julio**
***Plurnivela Internacia Kursaro***
intensivaj kursoj A-, B-, C-gradaj

**2-7 aŭgusto**
***5a staĝo pri beletra tradukado***
gvidas d-ino Perla Martinelli

**9-15 aŭgusto**
***11a Kultura E-Festivalo***
muziko, teatro, diversa kulturo
kunorganizas Studenta E-Ligo

***kunlaboris Ĥadiĝa Alieva, Anna Bartek, Manuela Blanco, Herman Dekeŭnink, Miroslava Kirova, Perla Martinelli, Giorgio Silfer.***

## AEI-programo 2022

**vendrede** ekde 17h00
***Verda Vendredo en la biblioteko***
A. Bukuru gvidas al la lego/spekto /aŭskulto de E-libro, filmo, disko

**februaro-aprilo**
***elementa esperanto-kurso***
por la najbaroj de la kvartalo
gvidas Abdul Rahman Bukuru

**2-7 majo**
***Staĝo pri didaktika perfektigo***
profesiigi amatorajn E-instruistojn
gvidas Marie-France Conde Rey

**dum la somera libertempo**
***dusemajna elementa E-kurso***
gvidas Lucien Kagina

**16-22 oktobro**
***Semajno de la E-Biblioteko***
*ekspozicio pri la E-novelarto*
tradukas Oscar Nizigiyimana

**15 decembro: *Zamenhofa festo***

**3-7 januaro 2023**
*8a Afrika Esperantologia Semajno*
Alessio Giordano (lingvistiko) kaj Giorgio Silfer (literaturhistorio)

*Heroldo de Esperanto 2332 (5: 2022)*

# Einladung zum REVELO-Tag und zur Landesversammlung des Rheinisch-Westfälischen Esperanto-Verbandes

**Alle Mitglieder des Rheinisch-Westfälischen Esperanto-Verbandes sind herzlich zur diesjährigen Mitgliederversammlung eingeladen.**

Sie findet während des REVELO-Tages am Samstag, 08.10.2022 ab 11:30 Uhr statt. .
Hierzu treffen wir uns in den Räumen der SCI: Volksschule Hanns-Albeck-Platz 2, 47441 Moers.

Informationen zum Programm des REVELO-Tages sowie eine genaue Wegbeschreibung schicke ich gerne per Briefpost oder E-Mail.

Ich bitte um Anmeldung bis zum 30.09.2022.

### Vorgesehene Tagesordnung:

**TOP 1:** Wahl des Sitzungsleiters. Begrüßung und Eröffnung. Wahl des Protokollanten. Feststellen der ordnungsgemäßen Einladung und Beschlussfähigkeit.

**TOP 2:** Feststellen der Tagesordnung.

**TOP 3:** Bericht des Vorstands. Bericht des Schatzmeisters.

**TOP 4:** Bericht der Rechnungsprüfer. Entlastung des Vorstandes.

**TOP 5:** Sonstige Aktivitäten und Anträge, soweit bis zur Sitzung eingereicht

**TOP 6:** Verschiedenes

In Ergänzung zur Tagesordnung können schriftliche Anträge sowie Bekanntmachungen an die Vorsitzende gerichtet werden.




**Petra Dückershoff**
Auf der Panne 74 a
44805 Bochum
*petra.dueckershoff@esperanto.de*

# *IntBlog* - das Interlinguistische Blog

**Elektronische Fortsetzung der mit Nummer 100 eingestellten gedruckten Zeitschrift *IntI* (Interlinguistische Informationen, *hier** online verfügbar).**

Im *IntBlog* informiert der Vorstand der GIL in unregelmäßigen Abständen über Neuigkeiten aus der interlinguistischen Forschung und nahe stehenden Wissensgebieten.

Beiträge über und Hinweise auf Veranstaltungen, Neuerscheinungen, Personalia usw. sind willkommen, bitte senden Sie sie an Cyril Robert Brosch (*kirilo81(at) gmail(dot)com*).

**http://www.interlinguistik-gil.de/wb/pages/blog.php*

Gesellschaft für Interlinguistik e.V.

# Carnap und Esperanto in neuem Sammelband

**Veröffentlicht von *Cyril Brosch* am Apr 22 2022.**

In dem neu erschienenen Sammelband „Logischer Empirismus, Lebensreform und die deutsche Jugendbewegung“* ist ein Beitrag von GIL-Mitglied Ulrich Lins enthalten.

Das Buch ist Open Access, der Aufsatz „Sprache transnational: Rudolf Carnap und die Esperantobewegung“ kann direkt als pdf** heruntergeladen werden.

**https://link.springer.com/book/10.1007/978-3-030-84887-3*

***https://link.springer.com/content/pdf/10.1007%2F978-3-030-84887-3_4.pdf*



# Kalendaro



## Junio 2022

**03-06: Oldenburg (Oldenburg), Germanio – Germana Esperanto-Kongreso 2022** - Kunlabore kun Esperanto Nederland. Informoj: *https://www.esperanto.de/eo/gek2022*

**03-12: Oldenburg (Oldenburg), Germanio – Kreema Esperanto KurSO (KEKSO) en Oldenburg.** Aranĝo taŭga por komencantoj kaj malferma al ĉiuj membroj kaj simpatiantoj de GEJ. Aliĝo: *tinyurl.com/OldbKEKSO*

**09-20: Niechorze, Pollando. 2-a Ĉemara Esperantista Amuza Feriado.** Informoj: *pomer@wp.pl*

**10-22: Mielno-Unieście, Pollando – 44-a Ĉebalta Esperantista Printempo.** Informoj: *stanislaw.mandrak@gmail.com*

**11-19: Bazel, Belgio: 4-a BEMI-semajno,** BEMI invitas ĉiujn ŝatantojn de biciklado al evento kun biciklaj ekskursoj taŭgaj por ĉiu nivelo. Informoj: *https://bemi.tejo.org/semajno/*

**23: Leeuwarden, Nederlando – Vizito al Leeuwarden.** Renkonto de esperantistoj: Hodiaŭ ni vizitos la urbon Leeuwarden, provinco Frislando (Friesland). Ni renkontas unu la alian en la halo de la trajnĉefstatio Leeuwarden, je la 10:30 h. Ni promenos tra la urbo, kaftrinkos, kaj se vi deziras ni poste lunĉos kune. Informoj: *www.pingveno.nl*

**23-26: Łódź, Pollando – 39-a Pola Esperanto-Kongreso.** Informoj: *www.esperanto.pl*

**25: Woudrichem, Nederlando – Kultura Tago kun koncerto de Kajto.** Informoj: *www.esperanto-nederland.nl*

**25-26: Chur, Svislando – Kunveno de Svisa Esperanto-Societo (SES).** Informoj: *mirejo.mireille(ĉe)gmail.com*

**25-26: Esperanta pikniko sur limo.** Pikniko de francaj kaj germanaj samideanoj. Informoj: *http://esperantostrasbourg.free.fr/index.html*

**25-03 jul, Roskilde, Danlando – Roskilde Festivalo 2022.** Festu kaj volontulu kun Esperanto-teamo en la granda publika festivalo. Informoj: *https://roskildefestivalo.wordpress.com/*

## Julio 2022

**04-08: Baugé-en-Anjou, Francio – 3-a Verda Naturisma Semajno en Greziljono,** naturisma evento, inkluzivanta kursojn kaj amuzojn en unu el la ĉefaj esperantistaj lokoj en Francujo. Informoj: *https://gresillon.org/naturismo?lang=eo*

**09-17: Klaipeda, Litovio – Baltiaj Esperanto-Tagoj BET-56,** tradicia Baltia Esperanto-renkontiĝo. Informoj: *http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56&ckattempt=1*

**11-12: Baugé-en-Anjou, Francio – 6-a Maratona Esperanto-kurso** kaj **34-a Konferenco IEK** post **OSIEK.** Informoj: *https://gresillon.org/maratona*

**16-23: Domaszék, Hungario – Kristana Kongreso / 71-a kongreso de KELI.** Informoj: *http://keli.chez.com/tekstoj/2022.kongresa.alighilo.pdf*

**23-27: Jelenia Góra, Pollando – Interkultura Julirendevuo.** Informoj: *informado.eo(ĉe)gmail.com*

## Aŭgusto 2022

**11-20: Moustier-sur-Sambre, Belgio – Tendumado 2022 de la Verdaj Skoltoj.** Aperta evento por ĉiuj 8-20 jaruloj. Informoj: *http://verdajskoltoj.net/skoltismo/*

**16-25: Baugé-en-Anjou, Francio – 12-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj.** Informoj: *https://gresillon.org/infana*

**18: Groningen, Nederlando – Kafumado en Groningen.** Esperantistoj kune trinkas kafon. Informoj: *www.pingveno.nl*

**20-27: Metabief, Francio –Restado kun matenaj kursoj de Esperanto.** Informoj: *stagemetabief@orange.fr*

**20-27: Westelbeers, Nederlando – 78-a Internacia Junulara Kongreso, IJK,** Informoj: *https://ijk2022.tejo.org/*

**20-28: Brescia, Italio – 89-a Itala Kongreso de Esperanto.** Temo: Paco ne okazas hazarde: la aktiva rolo de ĝemelurbaj rilatoj en la konstruo de eŭropa popolo. Informoj: *https://kongreso.esperanto.it/89/*

## Septembro 2022

**02-10: Lądek Zdrój, Pollando – 55-a Internacia Esperanto-Feriado.** Informoj: *https://sea-vroc.eu/*

**08-11: Sopot, Gdańsk, Pollando – 10-a Esperanto sur la strando.** Informoj: *esperanto-sopt.pl*

**16-18: Pardubice, Ĉeĥio – Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.** Informoj: *http://www.esperanto.cz/eo/akce/kongreso-de-e-a-esperanta-asocio-1339.html*

**23-25: Ieper, Belgio – Beneluksa Kongreso – Koruso-pacfestivalo.** Informoj: *https://www.esperanto.be/bef/*

## Oktobro 2022

**09-14: Detmold, Germanio – 10-a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA).** Informoj: *https://www.esperanto.de/eo/ema-eo*

**14-16: Bornerbroek, Nederlando – Esperanto Studosemajnfino** en natuurvriendenhuis Krikkenhaar 11, 7627 PA Bornerbroek, por komencantoj, komencintoj kaj progresantoj. Informoj: *https://www.esperanto-nederland.nl/esp/studosemajnfino/studosemajnfino.php* Aliĝo: *studsemajnfino@esperanto-nederland.nl*

**22, 18h: FAME kaj urbo Aalen** – transdono de la premio en KUBAA (Kulturbahnhof, Martin-Elser-Platz 1, Aalen) al la artistoj Ĵomart kaj Nataŝa. Wegen schriflicher Einladung bitte korrekte Postadresse ***bald*** mitteilen an *Einladung-FAME@esperanto-aalen.de!*

# Enkonduke

## Michael

**Hej! Ĉi-foje en ·kune· vi povos legi raportojn kaj impresojn de du junularaj Esperanto-renkontiĝoj, kiuj okazis antaŭ nelonge:**

Internacia Junulara Festivalo en Piani di Luzza, Italio, kaj la GEJ-Semajnfino en Halbe, Germanio.

Ja estas bele, ke nun en 2022 jam multe pli facilas renkonti aliajn junajn esperantistojn surloke! Tamen, por havi sukcesajn kaj agrablajn renkontiĝojn, necesas ankaŭ bona organizado. Tial ĉi tie ni ankaŭ alvokas aliĝi al la organizaj teamoj por la venontaj GEJ-Semajnfino kaj KEKSO, kiuj laŭplane okazu ĉi-aŭtune. Sekvas informoj pri tendumado en julio, kiun organizos la Verdaj Skoltoj kunlabore kun GEJ. Se vi ankoraŭ hezitas aliĝi al iu Esperanto-evento ĉi-jare, konsideru, ke por kelkaj eventoj vi povas ricevi subvencion por viaj vojaĝkostoj. Pri tio, ni ankaŭ donas al vi ĝisdatajn informojn en tiu ĉi eldono. Fine, se post tro longa ravita legado de Esperanto aktuell kaj ·kune· vi forgesis la tempon kaj nun subite rimarkas, ke vi malsatas, ni konsilas al vi provi baki bongustan karotan kukon (aŭ tortetojn!) kun glazuro de kremofromaĝo laŭ la recepto de Florian. Tiel vi ja povos kontentigi vian stomakon! Do jen, ĝuu la legadon…

Via **·kune·**-redakcio

# Raporto de Internacia Junulara Festivalo 2022

## Diego

**Saluton! Mi nomiĝas Diego kaj venas el Milano, Norditalio.**

Tiu ĉi artikolo temas pri mia sperto dum mia unua IJF, la Internacia Junulara Festivalo. Ĉi-aprile mi partoprenis ĝin. Mi komencis lerni Esperanton antaŭ iom malpli ol du jaroj, kaj jam estis ĉe la 88-a Itala Kongreso en Asizo, do entute tio ne estis mia unua fojo en Esperanta aranĝo. Okaze de IJF 2022 mi estis ano de la organiza teamo, kaj faris kelkajn etajn aferetojn por la festivalo: mi ekzemple skribis kaj tradukis mallongajn tekstojn por la oficiala retpaĝo IJF 2022 (*esperanto.it*), kaj preparis kaj aldonis kelkajn priajn bildojn al la instagrama profilo *@iejitalio.*

Ĉiukaze, mi nun rakontos ion pri miaj tagoj dum la evento! La ĉi-jaran IJF-n oni organizis en Piani di Luzza, bela montara vilaĝo tre proksima de la pli konata Forni Avoltri, kaj ankaŭ de Aŭstrio. La granda hotelo „Bella Italia“ gastigis ĝin. Mi aparte ŝatis la festivalejon, ĉar ĉirkaŭ ĝi estis multe da sportokampoj, mirinda lageto kun klara akvo, arbaroj kaj kompreneble



Esperantistoj konkeras la alpojn.



Diego dum IJF.

montoj. La loĝejo eĉ havis naĝejon kaj saŭnon, kiujn mi kelkfoje uzis por malstreĉiĝi. Antaŭ la enireja pordo, troviĝis ŝtona ŝtuparo, kiu kondukis al supera saloneto kun panorama vido de la montoj. Mi amas arton ĝenerale, kaj do mi povis ĝui la multnombrajn freskojn sur la muroj, kiuj montris tipajn scenojn de montara vivo aŭ lokajn bestojn. Trankviliga atmosfero!

Bone, mi nun parolos iomete pri mia alveno! Mi profitis de la fakto, ke mi feriis la tutan tempon de la daŭro de IJF por partopreni de la komenco ĝis la fino. La 13-an de aprilo, post longa vojaĝo – dum kiu mi devis preni du trajnojn kaj du busojn – mi finfine alvenis je la 16-a horo kaj estis preskaŭ neniu surloke, do mi estis unu el la unuaj, kiuj atingis Piani di Luzza-n. Poste, esti preninta la ŝlosilon kaj lasinta miajn valizon kaj dorsosakon en la ĉambro, mi faris mallongan promenadon en la ĉirkaŭaĵoj. Kiam mi revenis, jam estis kelkaj pliaj geesperantistoj en la hotelhalo, kiujn mi ankoraŭ ne estis ekkoninta tiam en Asizo. Mi rapide salutis ilin, ĉar mi tuj reeliris la hotelon por viziti la suban parton de la loko, kun gazonoj, arboj kaj montaj floretoj. Samtempe, mi estis atendanta Giovanni-n, Italan samideanon kaj amikon, kiun mi renkontis dum la lastjara Itala Kongreso. Kun li estis ankaŭ aliaj geesperantistoj, kiel ekzemple grupo da litovaj knabinoj kun iliaj instruistinoj, kaj alia pli eta grupo da tri knaboj el Pizo kaj ilia profesoro pri matematiko. Ni kune iris al la hotelo. Ni poste vespermanĝis kaj partoprenis la "Interkonan Vesperon", por ke ni povu prezenti nin mem al la aliaj kaj iomete konversacii.

Mi ĝenerale aprezis ĉiujn tagojn de la IJF, ĉar la programo estis plena je interesaj aktivaĵoj, kiel prelegoj kaj ekskursoj. Kutime, mi ĉiam partoprenemas ĉiujn eksursojn, kaj ankaŭ ĉi-foje mi faris la samon. Ili estis tri: al Forni Avoltri, al Sappada kaj eĉ al Triesto!

Dum la unua, ni vizitis la vilaĝon kun Novella del Fabbro, maljuna aktivistino de la friula lingvo. Ni ankaŭ vizitis muzeon pri la lingvisto Paul Scheuermeier kaj la iamaj kutimoj kaj vivmaniero de la teritorio. Ni manĝis lokajn specialaĵojn en restoracio.

La dua estis vere malfacila, ĉefe je la komenco, ĉar ni devis grimpi sur krutega monto, marŝante en mallarĝa vojo kun koto, sekaj folioj kaj falintaj arboj. Iom danĝera, sed ni poste atingis la neĝan supron de la monto. Kia mirindaĵo! La suno ne ĉiam brilis, tamen la vetero estis agrabla.

La tria ekskurso estis la plej longedaŭra: pli-malpli dek du horojn. Unue, ni vizitis la kastelon de Miramare, ĉe la maro kompreneble, kun praktike senfina ĝardeno de floroj kaj fontanoj. Eta haveno ankaŭ troviĝis tie. Sekve, ni moviĝis al Triesto. Ni havis gvidistinon, kiu montris al ni la plej konatajn urbajn vidindaĵojn, kiel la Bazilikon de Sankta Giusto, la Romian Teatron, la Grandan Kanalon, Placon Unità d'Italia … Ni vere faris multon dum nur unu tago!

Krom la ekskursoj, interesaj prelegoj estis organizitaj, kiel tiuj de Maria Chiara Visintin kaj de Novella del Fabbro mem. Ili kovris temojn, kiel la friulan lingvon, ĝiajn historion, hodiaŭan situacion kaj malfacilan estontecon. Alia aktivaĵo, kiun mi bedaŭrinde maltrafis, estis la "aligatorejo", speco de lingva ludo, dum kiu estas malpermesite paroli esperante, kaj oni povas aŭ devas uzi ĉiujn aliajn idiomojn. Do, vi komprenas, ke tio ĉi povas esti amuza improvizekzercado!

Ĉiukaze, la parto de miaj tagoj, kiun mi preferis, ĉiam estis la postvespermanĝa tempo, kiam estis koncertoj (tiuj de la okcitana kantisto JoMo, de la itala harpistino Clarissa Sabatini kaj de la grupo Bluzengaĝiĝo) aŭ ludoj (Sarabando kaj kvizoj) aŭ kulturaj iniciatoj (Lingva Festivalo, Trinkomanĝa Nokto kaj Internacia Vespero).

Mi tre ŝatis ĉion, ĉar ĉiam estis bona okazo por ekkoni homojn kaj lerni ion pri iliaj kulturoj kaj tipaj



Litova tablo ĉe la Trinkomanĝa Nokto.



Kviz-vespero gvidata de Roĉjo.

manĝaĵoj. Mi sukcesis plibonigi mian Esperanton kaj trovi novajn geamikojn, laŭ la kernaj principoj de amikeco, gastameco, respekto kaj “unueco en diverseco”, al kiuj Esperant(uj)o celas. Estas bele senti sin ero de komunumo kun tiuj ĉi valoroj!

Mardo, la 19-a de aprilo, bedaŭrinde estis la lasta mateno. Iom post iom, la tuta mondo lasis la hotelon. Mi estis unu el la lastaj, kiuj hejmenveturis. Ni foriris malfruege, ĉar ni antaŭe devis purigi la diskejon de la rubaĵo kaj kontroli ĉiujn ĉambrojn por konstati, ke neniu forgesis ion. Finfine, mi hejmenvojaĝis, kaj povis kuŝiĝi kaj ripozi en mia lito nur noktomeze. Mi iom tristiĝis, – ĉu postrenkontiĝa sindromo? :) – ke ĉio tiel rapide finiĝis, tamen mi nun havas belajn memorojn de ĉi tiu sperto, kiujn mi ĵaluze konservos, kaj mi senpacience atendas venontajn iajn aranĝojn! Nu, vi certe renkontos min dum la IJK en Nederlando! Do ĝis la! *(Pliaj fotoj pri IJF 2022 estas sur la dorspaĝo.)*

# Memoroj de la GEJ-Semajnfino en Halbe

**De la 22-a ĝis la 24-a de aprilo okazis renkontiĝo de GEJ en la Esperanto-Stacio en Halbe, apud Berlino. La ideo de tiu GEJ-Semajnfino estis, ke ni kuniĝu en malgranda rondo de aktivuloj kaj kolektu ideojn pri realigindaj projektoj.**

Surbaze de etaj prelegoj, ni ankaŭ diskutis pri motiviĝkialoj por esperanta agado, la valoro kaj la avantaĝoj de asocioj kiel organizformo, reciproka aprezado en teamoj kaj diversaj roloj de teamanoj. Krom 11 germanianoj, inter ili la ejestro Ralf, partoprenis ankaŭ unu internacia gasto el Francio, Gabin, kiu nuntempe vojaĝas petveturante tra tuta Eŭropo dum ses monatoj. Estis ĉarma etoso. Ĉi tie ni kolektis memorojn kaj impresojn de kelkaj partoprenintoj:

## Gabin

Tiu GEJ-Semajnfino estis fakte nur mia dua junulara Esperanto-renkontiĝo! Mi eklernis Esperanton dum la pandemio, kaj nun mi decidis vojaĝi por renkonti esperantistojn el tuta Eŭropo kaj samtempe altigi mian nivelon de Esperanto. Do, kiam mi vidis tiun eventon, mi decidis aliĝi! Estus bona okazo renkonti novajn junajn esperantistojn el alia lando!

Kaj nun mi povas diri ke estis bona decido! Estis plezuro renkonti la GEJ-anojn kaj ankaŭ malkovri la Esperanto-Stacion en Halbe. Tiu loko havas, mi kredas, grandan potencialon por estontaj renkontiĝoj, ĉu esperantaj aŭ aliaj. Kiam mi alvenis en tiu loko, mi povas imagi la laboron, kiun Ralf faris, tiu estas mirinda! La Esperanto-Stacio ankaŭ povas doni multajn ideojn de eventoj, kiujn homoj povas organizi tie.

Dum la semajnfino ni parolis pri eventoj kiujn GEJ povas organizi aŭ kunorganizi, kaj estos multaj eblecoj labori kun JEFO (Junulara Esperanta Franca Organizo) do mi multe ĝojas vidi tiujn du organizojn labori kune. Niaj rilatoj devas esti proksimaj, kaj mi certas ke kun iom da tempo ni pli forte kunlaboros! *(Plia foto estas sur la p. 30.)*


Grupfoto antaŭ la Stacidomo.

## Michaela

Mir hat das Wochenende in der Esperanto-Stacio viel Spaß gemacht. Die Location ist klasse, ich habe neue Spiele kennengelernt, alle waren super produktiv, und wie für einen Pfadfinder üblich, habe ich den Ort etwas ordentlicher hinterlassen, als ich ihn vorgefunden habe.

## Michael

Estis tre mojose denove renkontiĝi kun la aliaj GEJ-aktivuloj en la Esperanto-Stacio. Por mi persone estis la unua fojo en tiu sufiĉe nova kaj moderna ejo, kaj mi certe ŝatus iam reveni! La programo dum la semajnfino estis iom densa, ĉar ni multe kune cerbumis kaj laboris pri diversaj projektoj, kiujn ni ŝatus realigi kiel GEJ. Distriĝo tamen ne mankis. Mi precipe memoras, kiel ni ludis per ilo de virtuala realeco kun la helpo de Ralf, la estro de la ejo, kaj ankaŭ kiel ni spontanee-karaokee kune kantis kelkajn – bonajn kaj malbonajn – esperantajn kantojn dum la lasta vespero.

## Devid

Mi memoras la eksan vendejon de biletoj en la stacidomo: kun tia specifa eta fenestro, tra kiu oni transdonis la biletojn al la klientoj. Estas amuze char tiel oni kaj memodigas pri la antaŭa funkcio de la domo kaj nuntempe povas uzi ĝin por seriozaj aferoj (ekzemple eldoni enirbileton) au malseriozaj aferoj (ekzemple ludoj).

## Demlin

Estis tre bona etoso, kaj mi ĝuis revidi amikojn kaj ekkoni novajn homojn!

## Ralf

Mi memoras la energion, entuziasmon kaj karecon, kun kiuj ĉiuj umis en kaj uzis la Esperanto-Stacion. Estas tiu energio kiu transformas la stacion en lokon por la estonteco de Esperanto.



Ekskurso al memorloko pri Dua Mondmilito.



GEJ-laboretoso.

# Mach mit bei der Orga für Treffen im Herbst!

## Michael

Aktuell planen wir im Vorstand, im September ein 2. DEJ-Wochenende (GEJ-Semajnfino) zu veranstalten, auf das dann im Oktober wieder ein KEKSO folgen soll. Wir überlegen dabei gerade (Stand Mai), mindestens eines der beiden Treffen in Süddeutschland auszurichten, vielleicht sogar in Zusammenarbeit mit unser französischen Schwesterorganisation JEFO!




Du hast eine Idee für eine gute Location für kleinere Treffen (15–20 Personen)? Du möchtest das Programm mitgestalten? Oder einfach ein bisschen Orgaerfahrung sammeln und kleine Aufgaben übernehmen? Dann melde dich gerne per Mail (*gej.fe@esperanto.de*) bei uns! Helfende Hände sind immer gern willkommen! :)

KEKSO

# Zeltlager vom 11. bis 20. August in Moustier-sur-Sambre, Belgien

## Michaela

Die Deutsche Esperanto-Jugend organisiert dieses Jahr gemeinsam mit den Verdaj Skoltoj und der Skolta Esperanto-Ligo ein Sommerzeltlager in Belgien. Das Sommerzeltlager ist das wichtigste Treffen der Verdaj Skoltoj. Es kommen meist um die 20 Pfadfinder dieser internationalen Gruppe. Dieses Jahr soll es noch internationaler werden! Alle DEJ-Mitglieder und ihre Freunde im Alter von 8-26 Jahren sind eingeladen, daran teilzunehmen. Das Treffen ist AnfängerInnen-freundlich. Es ist auch möglich, nur einen Teil des Zeltlagers mitzumachen, je nachdem, wann du Zeit hast.

### Drei Pfadfinder-Gruppen, vier Programme

8-11-jährige, die Wölflinge. Dama und Korsako werden sie leiten.

12-16-jährige, die Pfadfinder. Sie werden betreut von Abelo und Orcino.

17-20-jährige, die Rover. Sie gestalten ihr Programm selbst.

Außerdem gibt es weitere junge Menschen bis 26 Jahre, die ebenfalls ein eigenes Programm durchführen können oder sich den Rovern anschließen dürfen.

Alle Gruppen sind im gleichen Haus, bzw. auf dem gleichen Zeltplatz untergebracht. In verschiedenen Bereichen. Es wird auch gemeinsame Programmpunkte geben. Aber generell werden die Gruppen ihr eigenes Programm mit eigener Atmosphäre haben. Die Wölflinge werden den Dschungel mit Mogli entdecken. Die Pfadfinder werden selbst kochen, spielen, sich zurechtfinden und entdecken! Die Rover machen das, was sie selbst entschieden und vorbereitet haben. Und was möchtest du machen? Freue dich auf dein persönliches Abenteuer!







### Wo ist das? und wie komme ich dahin?

Wir haben ein Pfadfinderhaus im Wald in der Nähe von Sambreville in Belgien gebucht. Das Haus bietet ausreichend Platz für 45 Menschen innen und ca. 20 Menschen in Zelten. Es liegt nur 2,5 km vom Bahnhof Moustier entfernt (von hier können wir dich abholen oder du gehst zu Fuß). Moustier ist mit dem Zug erreichbar aus Namur und Charleroi. In Belgien gibt es günstige Zugtickets für junge Menschen bis 26, z.B. von Aachen bis zum Zielbahnhof. Gern helfen wir dir auch bei der weiteren Reiseplanung.

### Kosten und Anmeldung

Mitglieder der DEJ zahlen 15€ pro Übernachtung abzüglich ihrer Reisekosten. Weitere Infos findest du unter esperantojugend.de und im Anmeldeformular unter tinyurl.com/tendumado2022.

# Neuigkeiten bzgl. Fahrtkostenzuschüssen

## Michael

In der letzten Ausgabe der ·kune· hat Jan euch mitgeteilt, für welche internationalen Treffen wir euch dieses Jahr mit Fördermitteln aus dem Kinder- und Jugendplan des Bundes Fahrtkosten erstatten können. In der Auflistung befand sich auch das SES in Tschechien, das mittlerweile aber leider abgesagt wurde.

Daher überlegen wir momentan, stattdessen Fördermittel für Fahrtkosten zu den Baltiaj Esperanto-Tagoj BET-56 zu beantragen (9.7. bis 17.7. in Litauen). Wenn ihr an diesem Treffen teilnehmen möchtet, informiert uns bitte per Mail an *gej.fe@esperanto.de* oder auf Telegram.

Nach wie vor anteilig förderbar sind Fahrtkosten zum UK (6.8. bis 13.8. in Kanada) und IJK (20.8. bis 28.8. in den Niederlanden). Um die Förderung in Anspruch nehmen zu können, müsst ihr unter 27 Jahre alt und in Deutschland wohnhaft sein.

Beim IJK findet dieses Jahr außerdem ein ganz besonderes Projekt statt, das ihr nicht verpassen solltet: Das weltweit erste Musical auf Esperanto, über Esperanto und für Esperantist:innen! Das Ganze wird von Roĉjo, Carlos und weiteren TEJO-Aktivuloj angeleitet, die dafür erfolgreich Fördergelder aus dem Erasmus-Programm der EU beantragen konnten. Wenn du als Schauspieler:in und Sänger:in oder auch einfach als Bühnenbildgestalter:in o. Ä. am Musical mitwirken möchtest, könntest du über dieses Projekt **sogar deine gesamten Unterkunfts-, Verpflegungs- und Fahrtkosten zum IJK** erstattet bekommen, vorausgesetzt du bist zwischen 13 und 30 Jahre alt und reist aus Deutschland an. Die Plätze sind allerdings begrenzt, also meld dich bitte erst bei uns vom DEJ-Vorstand, damit wir dich bei deiner Bewerbung für die Teilnahme beraten und unterstützen können!






**Ekskurso al la Esperanto-Butiko en Berlin-Kreuzberg kadre de semajnfina renkontiĝo de GEJ inter la 22-a kaj 24-a de aprilo. Legu pli sur la p. 27.**

# Karota kuko kun glazuro de kremofromaĝo

## Florian

Jen bakrecepto! Temas pri karota kuko kun glazuro de kremofromaĝo. Fakte mi pensis, ke mi havas foton de la kuko, sed domaĝe mi ja ne havas. Tamen mi ankaŭ bakis tortetojn laŭ la sama recepto kaj do povas aldoni ĉi tie foton de unu tia. Ĉu kiel (granda) kuko, ĉu kiel torteto, mi nepre rekomendas al vi baki kaj gustumi ĝin.

## Ingrediencoj



### Kuko:

- 180 g da sukero
- 4 ovoj
- 200 mL da planta oleo
- 3 grandaj karotoj (almenaŭ!)
- 1 pinĉaĵo da salo
- 1 pinĉaĵo da cinamo
- 3-4 tranĉaĵoj da freŝa kurkumo aŭ preskaŭ 1 kulereto da kurkumopulvoro
- 450 g faruno
- 1 paketo da bakpulvoro
- Iom da graso kaj faruno por la bakmuldilo



Bongusta! Jen foto de torteto bakita laŭ preskaŭ sama recepto.

### Glazuro:

- 400 g da kremofromaĝo
- 200 g da butero
- 100 g da pulvorsukero
- 1 paketo da vanilosukero (tre fajne muelita, alikaze grincos! – alternative uzu vanilan ekstrakton)

## Kiel procedi:

### Kuko:

Tranĉu la karotojn al pecoj de proksimume 2 cm kaj metu ilin en grandan miksaparaton.

Metu la miksaparaton sur pesilon kaj aldonu la sukeron, la ovojn, la oleon, la salon, la cinamon kaj la kurkumon.

**Konsileto:** por ne devi meti la oleon en mezurglason, vi povas kalkuli la pezon de 200 g oleo per ĝia denseco kaj ankau pesi ĝin en la miksaparato sur la pesilo:

» (karda aŭ kolza oleo) = 0,92 g / cm$^3$ » uzu 184 g de karda aŭ kolza oleo, aŭ

» (sunflora oleo) = 0,95 g / cm$^3$ » uzu 190 g de sunflora oleo. Vi trovas la densecon de diversaj oleoj sur *wolframalpha.com.*

Miksu la miksaĵon bone, ĝis ne plu videblas karotaj pecoj, kaj iom pli por certigi. En knedaĵobovlo bone miksu la farunon kun la bakpulvero kaj detruu la buletojn. Tiam ŝutu la enhavon de la miksaparato en la bovlon kun la faruno kaj bone kirlu. Grasumu la bakmuldilon kaj kovru la grason per iom de faruno. Baku dum 50 ĝis 60 minutoj ĉe 180 °C per cirkulada aero. Provu eltrovi per dentopikilo, ĉu ĝi jam estas tute bakita. Elprenu la kukon el la bakujo kaj lasu ĝin malvarmiĝi antaŭ ol apliki la glazuron.

### Glazuro:

Metu la buteron en bovlon kaj fandu ĝin en la resta varmo de la fermita kaj jam elŝaltita bakujo, post kiam vi elprenis la kukon.

Elprenu la fromaĝon el la fridujo por ke ĝi iom varmiĝu. La kuko devas malvarmiĝi iom, do ni havas tempon.

Se vi uzas vanilosukeron, nun muelu ĝin tre bone en elektra kafomuelilo, ĝis ĝi estas tiel fajna kiel pulvosukero.

Se vi uzas vanilan ekstrakton, ne uzu ekstrakton sur bazo de alkoholo.

Kiam la butero estas mola, kirlu ĝin kun la fromaĝo, la pulvorsukero kaj la vanilosukero. Kiam la glazuro estas bela kaj glate kirlita, distribuu ĉion sur la kuko. Kaj nun ĝuu!










**Internacia Junulara Festivalo 2022 en Piani di Luzza, Italio. Legu sur la paĝoj 25-27.**